

Num ankajen ePub formato!



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Decembro 2018 n-ro: 36



Merhaba,



Aralık sayımız aynı zamanda bir jübile sayısı. Bu 36. sayı ile üçüncü yılımızı tamamlamış oluyoruz. Bu da bizler için büyük bir başarı.

Bu sayımızda da birbirinde çok enteresan yazılar var. Mesela:

* yerli modern bilimkurgu alanında tercüme bir hikaye var: "La lasta spiro".

* ayrıca gene Türkiye'den "Pomeoj de Ali Lidar" adlı bir yazı daha var.

Bunların dışında da okumanız için bir çok irili ufaklı enteresan yazılar ve hikayeler de mevcut bu sayımızda.

Hepinize iyi okumalar !

Saluton,



Nia decembra numero fakte estas jubilea. Kun ĉi tiu 36-a numero ni kompletigas la tri jariĝon de nia revueto. Kaj tio estas granda sukceso por ni.

En ĉi tiu numero estas tre interesaj artikoloj.

Ekzemple:

* estas rakonto "La lasta spiro" el la loka moderna sciencfikcia verkado

* plue denove el Turkujo estas alia artikolo : "Poemoj de Ali Lidar"

Krom tiuj, en ĉi tiu numero troviĝas multaj aliaj grandaj aŭ malgrandaj interesaj artikoloj kaj rakontoj por via legado.

Bonan legadon al ĉiuj !

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI

www.CDELI.org

RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

TURKA STELO
Eldonanto : Turka esperantistaro
Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Volontulu por Esperanto en Slovakio	2
Esperanto Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leterojn ni ricevis el geamikoj	4
OSIEK Internacia Esperanto Konferenco-2019	4
Renkontiĝo de kulturoj dum interlingvistika sesio en Poznano	5
Kial mi ne plu partoprenos la UK-n	6
Kial mi partoprenos UK-ojn	7
Rompita flugado	9
AKAMASO, FILISA, DEMOFONO	10
Multaj vojoj kaj unu falo	12
La lasta spiro	15
El la libro de "Dao de Jing" (28)	17
La Aŭtunaj Muŝoj (parto 7)	17
Ŝercoj	18
Kurcvortenigmo	18
Mallonga Historio de Filozofio (34)	19
Memnon	19
Diablo dunglaboras	20
Grilo kaj Aliflor	21
Pri transnormalaj fenomenoj	21
Floro (2)	22
Poemoj de Ali Lidar	23
La vojeto	23
Mia sperto pri Esperanto	24
La virineto de maro	24
EKRA 2018	25
Martin – grava centro de la slovak historia kaj kulturo	25
Mia sperto de UK en Kopenhago	27
Mia korespondanto kaj amiko Rob Moerbeek el Nederlando	30
Modesta trezoro por ĉiuagaĝaj adoleskuloj	31
Facilaj rakontoj	32
Fraga Smuzio	32

Kursoj



Nuntempe okazas nur unu kurso en la lernejo Üsküdar Amerikan Lisesi en Istanbul kun 9 lernantoj kaj kies gvidanto estas Murat Özdizdar.

<https://edukado.net/kursejo?kid=26934>

Volontulu por Esperanto en Slovakio!

Danke al subteno de Eŭropa Unio, E@I gastigas junajn volontulojn en sia oficejo en Slovakio jam ekde 5 jaroj. Se vi ŝatus subteni la movadon kaj agadon de E@I dum 10-12 monatoj, ne hezitu, kandidatiĝu!

Kandidatiĝi rajtas ĉiu loĝanto de Eŭropa Unio aŭ najbara al EU lando kiu aĝas inter 18 kaj 30. Rekompenco: 300 EUR/monate (pure), senpaga loĝado kaj veturkostoj por veni al Slovakio.

Legu pli ĉe evs.ikso.net

Erasmus+ VOLONTULU EN ESPERANTUJO!
 Grupa Internacia Servo de Edukado/Erasmus

Ĉiuj...:

- estas voluĝema, juna (18-30-jara) esperantisto de Eŭropa Unio aŭ najbara al EU lando?
- estas aktiva (voluĝig) pri Esperanto (partoprenis aliajn organizadojn de amikoj: Nacia Esperanto Studado, KACE, LingvoFest, Projekto Esperanto, aŭ aliolugoj de internaciaj projektoj); Voluĝite kaj volas hege la disvastigadon de Esperanto?
- estas dum 10-12 monatoj senpaga loĝo en la Esperanta (E@I) de Slovakio kaj esti membro de internacia teamo, kiu (dunge laboras en Esperanto kaj pri Esperanto)?
- partoprenas 10-12 jarojn de via vivo por subteni agadon de E@I?
- desiras ekde Slovakio, gajni kulturon kaj lingvon?
- volas voluĝi esperantistojn al la teamo kaj kunlabori kun ili?

La projekto kovras internaciajn honorojn de:

- loĝado (por 1-2 personoj (komunale))
- manĝado (150 EUR monate)
- detaloj
- vojaĝo al kaj de Slovakio
- kiu detaloj elrevens 150 EUR monate (sen partopreni)
- Igu parto de nia teamo!

EUROPA VOLONTULA SERVO

demandado
 demando@evs.ikso.net

kandidatiĝu
 kandidatu@evs.ikso.net

helpu plu
 helpu@evs.ikso.net

volontululo
 info@evs.ikso.net

evs.ikso.net

tejo

“Mi eklernis Esperanton por lerni ion facilan kaj havi internacian rondon de amikoj. Nun, ĝi estas mia ĉiutaga lingvo, mia hejma lingvo.”

—MARIA MICKLE

Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



Sumoo estas japana tradicia lukto. Ĉiun jaron okazas 6 konkursoj en neparaj monatoj:

januaro, marto, majo, julio, septembro, kaj novembro. Unu konkurso daŭros 15 tagojn. Dum la luktokonkurso luktistoj estas grupigitaj en 5 grupoj. Plej fortaj luktistoj luktas en grupo nomata Jokozuna. Poste sekvas grupoj laŭ fortoj de luktistoj nomataj: Oozeki, Sekiŭake, Komusubi, Maegasira.


Okaze de tiuj konkursoj, mi proponas al vi partoprenon en lukto, kie homoj ne luktas kontraŭ aliaj homoj, sed kie homo luktas kontraŭ siaj malfortajoj. Tiu estas la Esperanto-Sumoo konkurso en kiu paralele kun la Sumoo-konkursoj ni legu Esperanto-librojn dormantajn en nia breto.

Vi decidu kiun libron kaj kiom da paĝoj vi legu ĉiun tagon dum la konkurso. Se vi sukcesos legi tiun kvanton, vi venkos, se ne, tio signifas vian malfortaĵon. Tiamaniere vi povos vere scii la ĝojon de Esperanto-legado, sekve vi progresos multe en Esperanto, kaj se multaj partoprenos en sumoo, tio ŝanĝos la movadon, kaj sekve la mondon.

Ni partoprenu kaj luktu ĝoje!!!



UEA



N-ro 766 (2018-11-19)

Elektio de komitatoj B de UEA: kandidatigo!

En 2019 okazos elekto de novaj gvidorganoj de UEA por la periodo 2019-2022. Parto de ĝi estos elekto de komitatoj B por reprezenti la individuajn membrojn (IM) en la Komitato de UEA. Laŭ la Statuto (art.24) oni elektas unu komitatanon B por ĉiu komencita milo da IM. Laŭ la antaŭvidata nombro de IM oni elektos kvin komitatojn B. [...]

N-ro 765 (2018-11-16)

Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago por Toleremo, 16 novembro 2018

"Toleremo," lastatempe deklaris la Ĝenerala Direktoro de Unesko Audrey Azoulay, "estas humana ago, kiun ĉiu el ni devas nutri kaj praktiki en la propra vivo ĉiutage, por jubili pri la diverseco, kiu fortigas nin kaj la valoroj, kiuj nin unuigas." [...]

N-ro 764 (2018-11-02)

"Vivanta naturo, floranta kulturo": kongresa temo de la 104-a UK

#Lahtio2019

La kongresa temo de nia 104-a UK estis elektita de la Estraro de UEA komune kun la LKK kaj formale anoncita la 3-an de aŭgusto, fine de la 103-a UK en Lisbono, kiel eblas rememori en la kongresa retejo: www.esperanto.fi/uk2019/kongresa-temo/. Ĝi estas "Vivanta naturo, floranta kulturo". [...]

TEJO



Kontribuu al video por la Zamenhofa Tago 2018

Partoprenu en la video de TEJO por ĉi-jara Zamenhofa Tago! Por festi la Zamenhofan Tagon kaj sciigi homojn pri Esperanto kaj la vicleco de nia movado, ni kreas videon kies temo estas "Esperanto estas mojosa!"

Ni bezonas vian kontribuon kaj vian kreemon! [...]

Nova numero de Revuo Kontakto – Brazilo Brulas

La nova numero de Revuo Kontakto ĵus aperis en la reto! La ĉeftemo de la numero estas Brazilo Brulas – La incendio en nacia muzeo kaj en politika konflikto al kiu Roger Waters ĵetis brulaĵon. La abonantoj povas elŭti la elektronikan version de la revuo. [...]

TEJO Trejnista Renkontiĝo en Roterdamo

TEJO Trejnista Renkontiĝo okazis en Roterdamo la 10-an kaj 11-an de novembro. La trejnistoj pridiskutis la planon por la venontaj ses monatoj. Aldone, oni organizis atelierojn pri diversaj temoj por kunhavigi spertojn kaj ideojn pri plej bonaj praktikoj en trejnadliverado. [...]

Estu Kunsidestro de la Komitatkunsido de TEJO

Estu Kunsidestro de la Komitatkunsido de TEJO dum JES (Junulara E-Semajno) 2018 en Storkow, Germanio! La Kunsidestro estas la homo, kiu je iu ajn momento, efektive kaj laŭrajte prezidas sesion de la komitatkunsido. [...]



Leterojn ni ricevis el geamikoj

Dankon por la Turka Stelo 34!

La revuo pli kaj pli imponas! Vi vere faras belan laboron! Por mi estas honoro, ke mi aperis dufoje en ĝi! Longan vivon al tiu Stelo!

Dr. Paulo Sérgio Viana, el **Brazilo**


Saluton!

Mi volas gratuli vin pro la oktobra numero de via revuo, neniel revuETO. Bonvolu shanĝi la vorteton! Ĝi estas riĉa pro la enhavo, pro la beleco, pro la tekniko. Mi printis ĝin kolore. La artikolo pri mi estis tute en ordo pri la enhavo, kaj la prezento perfekta.

Gratulojn kaj dankojn!

Gersi Alfredo Bays, el **Brazilo**

(sur la foto Gersi kun Turka Stelo #34)



Internacia Esperanto-Konferenco - 2019



Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj

<http://osiek.org>

Internacia Esperanto-Konferenco – 2019
de la 13-a ĝis la 19-a de julio en **Kondoros,**
Hungario

Temo: Hungara kulturo

Loka adreso: Pál KOZSUCH, Csabai út 2., HU-5553
Kondoros, Hungario

poŝtelefono: +33 6x xx xx xx

retadreso: pauljuno@freemail.hu

Loko: Kondoros [kondoroŝ] estas grandvilaĝo en Hungario, en regiono Suda Ebonaĵo, je 100 km de Kecskemét [keĉkemet] kaj 45 de Rumanio. Kondoros situas sur la ĉefvojo Kecskemét-Békéscsaba [bekeŝĉaba]

Konferencjo: La konferenco okazos en la tradicia malnova restoracio «_Ĉardo».

Loĝado

-- Gastejo kun klimatizitaj ĉambroj, 13 € / nokto / persono. Nur 5 ĉambroj haveblas.

-- Gastoĉambroj dise en la vilaĝo, 10 € / nokto / persono

-- Studenta hejmo, 5 € tage, 5-6-litaj ĉambroj kun komuna necesejo kaj duŝejo.

Noto: la prezoj ne estas garantiitaj, kaj povas varii laŭ la kurzo.

-- Ankaŭ eblas malkoste tendumi.

Manĝoj:

La konferencjo estos la Ĉardo mem, tie estos antaŭpagebla matenmanĝo kaj ankaŭ tagmeza kaj vespera menuo. Matenmanĝo kostas 3 €, tagmanĝa menuo kostas 5 €, vesperma menuo 4 €.

Komprenoble ĉiam eblas manĝi libere laŭ la karto de la restoracio.

Dumkonferenca programo:

Matene: tema programo, statuta programo, libroservo

Posttagmeze kaj vespere:

-- Interkona vespero.

-- Festa vespero kun loka citromuziko.

-- Ekskurso sur ĉevaltiritaj ĉaroj.

-- Vizito de apudaj famaj kuracbanejoj.

-- Ekspozicioj de lokaj fotistoj

-- Vizito ĉe lignoskulptisto

-- Kaj multaj aliaj surprizoj...

Por aliĝi bonvolu kontakti lokan adreson kiu troviĝas supre

La septembra sesio de la Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz signifis la komencon de la dua studjaro de la 7-a interlingvistika grupo. Partoprenis ĝin 10 gestudentoj el 8 landoj (Brazilo, Ĉinio, Koreio; Germanio, Francio, Hispanio, Pollando kaj Rusio). Post plenumo de ekzamenoj sekvis 4 kursoj: la duan semestron de interlingvistiko gvidis – kiel kutime – Vera Barandovska-Frank, kontribuis al ĝi Ida Stria (eksstudentino de IS kiu doktoriĝis pri interlingvistika temo en 2016). Ŝi prelegis pri literaturaj kaj interretaj hobiaj lingvoj. Nicolau Dols (profesoro en la Universitato de Balearaj insuloj) instruis la konstruitan lingvon Toki Pona.



Enkondukon al ĝeneralaj leksikologio kaj semantiko gvidis Michael Farris el UAM kaj kontribuis Nicolau Dols. La dua semestro de esperanta gramatiko okupiĝas pri sintakso, kiun prezentis ĉi-foje Marc Bavant (eksstudento de IS, d-ro kaj membro de AdE) kaj Ilona Koutny. La tria semestro de esperanta literaturo koncentriĝis al la tria (postmilita) periodo, ĝin prezentis Istvan Ertl (ia. redaktoro de Beletra Almanako).



Ĉeestis la semajnon ankaŭ Katalin Kovats, kiu taskita de ESF (Esperantic Studies Foundation), intervjuis la

studentojn kun la celo informi pri iliaj spertoj kaj planoj kaj eventualaj bezonoj de financa subteno. Aldonendas ke ESF pagas la studkotizojn de 6 studentoj kaj disponigas ankaŭ subvenciojn por vojaĝkostoj, kiuj el foraj landoj (aziaj kaj amerikaj), jes ja superhome ŝarĝas la studentojn. Se vi volas kontribui al tio, bv. donaci monon al tiu celo al ESF, kaj la fondaĵo duobligos la ricevitan sumon.

La septembran sesion fermas kutime la kultura festivalo ARKONES (organizita jam la 34-an fojon ĉijare), dum kiu abundas prelegoj kaj krom ili la ĉeestantoj, venintaj ne nur el diversaj partoj de Pollando, sed ankaŭ el aliaj landoj, kiel Germanio, Litovio, Francio, Ukrainio, Ĉinio, Koreio, povis ĝui muzikajn kaj artajn prezentojn.



La programon de ARKONES multe riĉigis la kontribuoj de la prelegantoj kaj studentoj de la Interlingvistikaj Studoj (Nicolau Dols, Istvan Ertl, Michael Farris, Ilona Koutny, Ida Stria, Katalin Kovats kaj Christophe Chazarein). La kortuŝa kaj altnivela koncerto de la koreoj realiĝis danke al la kontribuo de Unika (Jung Yuro), studentino de la IS.

La semajno estis utila kaj interesa renkontiĝo de diversaj – eĉ aziaj – kulturoj pere de Esperanto.

Raportis **Ilona Koutny** kaj **Katalin Kovats**

Fonto <https://edukado.net/novajhoj?id=762>



Robert Nielsen opinias ke ĉiu devus partopreni en Universala Kongreso – sed ne pli ol unu fojon. Almenaŭ dum ne esence ŝanĝiĝos la UKoj. Ĉu temas pri netranspontebla diferenco generacia? Jen analizo el junula vidpunkto.



La libroservo de la UK en Lisbono. Foto: Kalle Kniivilä

Mi opinias ke ĉiuj esperantistoj partoprenu iun Universalan Kongreson almenaŭ unufoje dum sia vivo. Mi mem partoprenis trifoje: 2015 en Lille, 2016 en Nitra kaj 2018 en Lisbono. Ĝi estas la plej granda esperanta renkontiĝo, kun longa historio kaj grava rolo en Esperantujo. Mi memoras la senton kiun mi havis dum mia unua UK, mi neniam vidis tiom multe da esperantistoj en unu loko. Esperanto estas apenaŭ konata en mia lando, sed jen granda ondo da homoj kiuj scias la lingvon. Ĉeestis nekredebla kvanto da homoj el la tuta mondo kaj multaj asocioj kun diversaj temoj.

Sed mi ne plu partoprenos. Dum la kongreso estis multaj tedaj prelegoj kaj prelegantoj kiuj agis kvazaŭ paroli esperante sufiĉu kaj ne necesus krome esti interesa. Mi ne memoras el kiom da prelegoj mi eliris antaŭ la fino pro enuo, sed estis multaj. Dum IJK, mi ĉeestis prelegon pri virinaj aŭtoroj en Esperanto, kaj la sperto estis tute alia ol dum UK. Ne nur la temo estis malsama, sed ankaŭ la prezento. La preleganto parolis klare, laŭte kaj vigle, li vere strebis teni la atenton de la ĉeestantoj per siaj voĉo kaj agoj. Mi estis tre impresita kaj subite ekpensis ke neniu prelegis tiel dum la UK.

UK ne estas bona loko por junuloj. Eble iuj malkonsentas, sed mi forte opinias ke junuloj kaj maljunuloj havas malsamajn interesojn kaj ŝatojn. Tio kio interesas maljunulojn ofte estas teda kaj enua por junuloj. La partoprenantoj de UKoj estas ege maljunaj, kaj tio malfaciligas la rilatojn inter la du grupoj, ĉar la kongreso aspektas kiel domo por emeritoj. Junuloj

volas festi, amuziĝi kaj drinkumi – sed dum UK, ne estas festoj, nur prelegoj. Eĉ dum la koncerto, la plejparto de la homoj nur sidas kaj silente observas (kaj nur kelkaj junuloj dancis). La plej bonaj momentoj estas dum la junulara programo, sed tiu okazas ekster la oficiala programo. Unu el miaj plej ŝatataj momentoj dum UK estis kiam ni havis piknikon en iu parko dum la Lilla kongreso – sed tio okazis kiam ĉiuj aliaj ekskursis.

Sed la plej granda problemo estas la etoso (aŭ manko de etoso). La plej bona parto de ajna kongreso estas la etoso, sento malfacile priskribebbla, kiun tamen ĉiuj sentas. La plej bona parto de renkontiĝoj estas ne la programo, sed la homoj. Mi partoprenis renkontiĝojn kun ĥaosa organizado en aĉaj lokoj, kiujn mi tamen multe ĝuis, ĉar la homoj estis tiel bonaj kaj amuzaj. Sed ne estas etoso dum UK – nenio okazas ekster la programo. Ne facilas babilo kun aliaj partoprenantoj, ne estas komunaj lokoj por ripozi kaj renkontiĝi. La etoso en UK estas pli propagandema kaj homoj iam troigas. Nur dum UK oni vidas homon kiu uzas la Esperantan flagon kiel mantelon kaj faras longajn paroladojn pri la “miraklo” de Esperanto.

Kiam mi pensas pri IJK, mi pensas pri la bonega etoso, la novaj amikoj kiujn mi akiris kaj la malnovaj kiujn mi ĝoje revidis. Ĉiam mirigas min kiel fortan amikecon oni povas krei ene de nur kelkaj tagoj. Oni honorigas la lingvon per amuzado kaj ĝojo, ne per solenaĵo kaj paroladoj. Mi pensas pri la horoj da dancado, drinkado, festumado, babilado, flirtumado kaj amuzado. Mi pensas pri la ludoj en la trinkejo, babiladoj en la koridoroj kaj umado en la komunejo. Sed kiam mi pensas pri UK . . . Kion mi pensas? Plejparte mi simple ne memoras, ĉar nenio donis fortan impreson al mi. La longegaj solenaj malfermoj? La troigita adorado de Zamenhof?

Oni povus trakti la libroservon kiel metaforon por la UK. Ĝi enhavas multajn bonajn aferojn. Estas multaj bonkvalitaj libroj (mi aĉetis kelkajn dum la kongreso) kun interesaj tekstoj kaj gravaj vortoj. (Ankaŭ estas kelkaj strangaĵoj kaj amatoraj verkoj.) La libraro estas grava parto de nia kulturo kaj la viveco de nia movado kaj lingvo. Sed la libroservo ankaŭ estas malmoderna. Oni eĉ ne povas pagi per kreditkarto, anstataŭe oni devas uzi iun strangan antikvaĵon, kiun mi opinias pli taŭga en muzeo (la aĵo estas tiel antikva ke eĉ en mia denaska lingvo mi tute ne scias la nomon). Mi dubas ĉu ili eĉ aŭdis pri elektronikaj libroj kaj verŝajne opinias ke tiuj estas tro novaj kaj neelprovitaj (kiel flugantaj aŭtoj). Dume, en la neesperantuja mondo, elektronikaj libroj furoras tiel

>> 8

Ĉu vi havas ŝatatan bildon? Tian, al kiu rigardante vi ĉiam sentas vin viva, kiu donas al vi sian humoron? Certe jes, ankaŭ mi havas tian bildon. Kaj mi havas ankaŭ unu Esperanto-renkontiĝon, kiu por ĉiam restos por mi unika, kiu ĉiam montris al mi ke mi estas viva kaj donis al mi sian neripeteblan etoson. Sed ĉu vi vizitas bildgaleriojn? Certe kelkaj fieruloj respondos al mi per frida "neniam".



Sed kien vi, miaj fieruloj, venigos vian eksterlandan amikon por vekti en li admiron pri la kulturo de via lando? Kien vi iros, kiam vi ekvolos propraokule vidi, kiel vivis kaj revis via popolo antaŭ centoj da jaroj, kion pentris homoj, kiam ie militis via avo, kaj kiel, kiam via panjo unue, ruĝiĝante kisis amatan

knabon? Kien vi iros por vidi, kiel homoj revas kaj pentras nun, almenaŭ por iomete miri pri tiu stranga moderna arto, kiu ĉiam paŝas pli rapide ol la reala vivo?

Bildgalerio estas ja tempmaŝino kaj teleportilo, kiu montras pasintecon kaj estontecon en plena riĉeco de ĝenroj, de bildoj realismaj ĝis la plej misteraj ludoj de menso kaj fantazio. Via amata bildo ĉi tie ne helpas al vi, vi bezonas galerion. Tia galerio ĉiam estis por mi Universala Kongreso – tro solene maljuna parte, mezepokece patosa kaj simboloplena parte, parte moderneca, same malfacile komprenebla, kiel moderna arto.

Mi foje renkontas homojn, kiuj subite ekstarante en koridoro de bildgalerio patose mansvingas, kaj postulas, ke oni forprenu el la haloj ĉion malplaĉan, ke oni lasu nur la bonajn bildojn, kiuj kongruas unu kun la alia, ke oni faru lumon kaj muzikon, ke estu etoso anstataŭ bunta bruoj! Mi ne komprenas ilin. Mi ŝatas la klerigan buntecon de galerioj. Mi ŝatas la klerigan buntecon de la UK-oj.

UK estis mia unua Esperanto-renkontiĝo. Tiu estis la UK en Roterdamo en la jaro 2008. Mi tiam estis komencanto, la unuan fojon vidanta esperantistojn, kaj mi estis 20-jaraĝa impresiĝema knabineto. Kaj tiam, dum miaj unuaj tagoj en Esperantujo, mi komprenis unu gravan aferon, kiu ĉiam subtenis mian kredon je Esperantujo – Esperantujo estas diversa. Tiam min plene kaptis tute neordinara por mi sento, ke

mi kvazaŭ samtempe partoprenas plurajn renkontiĝojn, ke mi samtempe troviĝas en diversaj mondoj.

La scienca parto similis al tio, kion mi spertis dum mia studado en universitato, forme kaj enhave. La kultura parto estis duone kvazaŭ mi vizitas teatron, duone kvazaŭ mi dancas kun amikoj kun akompano de kare konata muzikisto. La solena parto estis tio, kion mi antaŭe ne spertis, sed ege ekŝatis sperti, io, kio kvazaŭ rekreas ligan inter nuntempo kaj pasinteco, kaj la fluado de la tempo iĝas videbla, kaj la historio iĝas vivanta estaĵo, kies nova paĝo kreiĝas nun. Sed mi ja estis 20-jaraĝa, kun facile ŝanĝiĝanta humoro, mi facile ŝanĝis la rolon de studento dum scienca prelego al la rolo de spektanto, dancanto, kunludanto; la rolon de komunumano, kiun la historio enplektas en sian sinon dum patosa himnokantado, al la rolo de junulo, kiu sidas kun junuloj el diversaj landoj sur la planko, koketeme babilante.

Mi amikiĝis kun japanino, kaj ni kune faris origamiojn. Kaj ĉiutage min atendis iu novaĵeto: evidentiĝis, ke Esperantujo havas bildkartojn kaj monerojn, renkontiĝojn de biciklistoj kaj fervojistoj, "Rondon Kato" kaj IKU-prelegojn kun ekzamenoj kaj diplomoj, eĉ futbalan teamon. Ĝuste pro tio daŭre mi ŝategas la Movadan Foiron; vizitante ĝin dum pluraj kongresoj, mi ĉiam ekscias pri io nova, funkcia por aŭ en Esperanto.

Oni diras, ke UK ne havas etoson. Jes, ne etoson, sed etosojn. Etoson de scienca konferenco kaj etoson de futbala matĉo, etoson de solena historieca kaj simboleca malfermo kaj etoson de vigla ekskursumado, etoson de koridora amika babilado kaj etoson de klasika koncerto aŭ teatro, etoson de vojaĝo tra la landoj kaj etoson de vojaĝo tra la tempoj... Mi ŝatas renkontiĝojn kun forta, profunda etoso, kiu kvazaŭ kolorigas la vivon per sia koloro. Sed uzante la saman alegoron de kolorigado, mi diru, ke UK estas kvazaŭ vitralo, fenestro farita el centoj da koloraj vitropecoj, kiu farbas la lumon diverskoloro. Laŭ mi, diri, ke UK ne havas etoson, estas same kiel diri, ke ĉielarko ne havas koloron. Jes ja, ĝi havas ne koloron, sed kolorojn.

Mi ŝatas la Kongresan Universitaton. Opiniu min infano. Mi mem opinias min infano, kiu subite eniris mondon de tute realaj sciencistoj, kiuj konstruas, kuracas, kalkulas, kaj mi estas inter ili, kiel aŭskultanto ofte, foj-foje kiel preleganto, kvazaŭ mi jam estas plenkreska. Jen por vi unu trajto de ajna juna homo: li ankoraŭ ne kredas, ke li vere faras tion, kion li faras, eĉ se tio estas tre serioza, li opinias sin dume parte

6 >> multe ke ili detruis kaj forigis multajn librovendejojn kiuj vendis nur paperajn librojn. La mondo ŝanĝiĝas, kaj tiuj kiuj ne ŝanĝiĝos, ĉu paperaj libroservoj aŭ tradiciaj kongresoj, suferos.

Sed granda problemo estas ke la bona libroservo havas aĉan libroservestron. Ĉi tiu ne estas nur mia persona opinio, multaj homoj scias pri kio mi parolas kaj mi aŭdis kelkajn plendojn dum UK. Ĉiuj scias pri lia malafableco, malĝentileco kaj nehelpemo, sed la stranga afero estas ke neniu faras ion por plibonigi la situacion. Ĉiuj organizoj havas problemojn, sed kiam ĉiuj scias pri problemo, sed nenio ŝanĝiĝas, tio estas ĉagrena. Tio ke UEA kaj UK havas problemojn ne ĉagrenas min, ĉar ĉiuj organizoj havas tiajn, sed tio ke neniu provas solvi la problemojn ja ĝenas min. Oni ne malhelpu kaj forpuŝu homojn per malĝentileco, poste

7 >> ludanta. Aparte mi ŝatas la sciencan kafejon, kie tiuj seriozaj homoj tenere ŝatantaj siajn teoriojn kaj sciencojn devas transdoni ilin al aŭskultantoj en 15 minutoj. Ankaŭ tion mi traktas kiel sciencan ludon. Mi, jam dumlonga universitata instruisto en mia lando, neniam estis tiel fiera pri scienco, kiel ĉi-scienckafeje en Lisbono, kiam en la salono funkciis nek klimatizilo nek mikrofono. Ni voĉdonis, ĉu malfermi la pordon kaj nenion aŭdi, aŭ fermi la pordon, aŭdi ĉion kaj pereji pro sufoko. Certe ni unuanime voĉdonis por pereji.

Mi foj-foje aŭdas ke la prelegoj dum UK estas enuaj laŭforme. Ke prelegantoj ne ofte ridetas, ne saltas, ne svingas per la manoj kaj ne penas trovi kontakton kun ajna vizitanto. Sed, damne, se vi volas aŭdi pri astronomio, pri veraj steloj, pri veraj planedoj, de homo kiu fordonas al ili sian vivon, evidentas ja, ke rakontante li pensas pri steloj, ne pri vi. Kaj se li

pensas pri vi, do ne atendu de li stelojn.

Same mi miras, kiam mi aŭdas plendojn pri amatoreco de tiuj programeroj, kiuj tradicie kaj regule estas amatoraj, ekzemple de la Internacia Vespero, kie kuraĝaj, strebemaj, ofte amuzaj kaj ĝislarne kortuŝaj homoj uzas sian okazon – povas esti la unuan kaj la



lastan – montri sin antaŭ kelkcent okulparoj. Tio ĉiam similis por mi al tradicio preskaŭ ne ekzistanta plu en la moderna mondo, tiu de familiaj artaj vesperoj, tiom feste, tenere parencaj. Kaj poste venas plendoj pri malspertaj nespertuloj. Sed ĉu ne ŝajnas al vi, ke spertaj malspertuloj estas iom oksimorono?

mirante kial homoj ne revenas.

Mi ankoraŭ estas juna kaj intencas ĉiam esti esperantisto, do mi ne volas diri ke mi neniam denove partoprenos eĉ unu UK-on dum la sekvontaj 50 jaroj. Sed dum la venontaj kelkaj jaroj mi ne iros. La aferoj kiujn mi amas pri aliaj renkontiĝoj – la etoso, la amikoj, la amuzo – ne estas ĉe UK. Esperantujo estas bunta kaj vigla mondo, kun multaj interesaj renkontiĝoj kiuj allogas min pli ol la polva kaj eksmoda Universala Kongreso.

verkis **Robert Nielsen**



Fonto: <https://www.liberafolio.org/2018/10/04/kial-mi-ne-plu-partoprenos-la-uk-n/>

La plendo pri malafabla libroservisto pikis min persone. Mi estas literaturisto, la libroservo estas mia sankta katedralo. Ĉu ne tro patose? Pardonu min, estas profesia malsano. Same kiel vi ĉiuj, mi ŝategas rigardi en la libroservo braceletojn, t-ĉemizojn, librojn kun la plej belaj kovrilpaĝoj; librojn, kiuj estas popularaj, librojn, kiujn mi legis propralingve... Kaj la libroservisto ja legis plejparton de tiuj libroj, persone konas ilin, zorgas pri ili, polvon de ili forviŝas, ĉu povas li esti afabla kun mi, apoganta min al tablo kun klasikaĵoj por pli bone vidi novan ĉemizeton?

Denove tro patose, ĉu? Mi estas fabelisto. Mi bone scias, ke arda astronomo, kiu kapablis proklami unuafoje, ke la Tero estas ronda, facile povus eĉ faligi min en la strato, tute ne rimarkante tion. Mi scias, ke sensperta sorĉisto faras amuze stultajn, neforgeseblajn miraklojn ĝuste ĉar li estas vere sensperta. Mi scias ke ĉiuj gardantoj de la ejoj, kie kaŝas sin scioj kaj enigmoj de la homaro, estas kverelemaj, ĉar, damne, kun ili pereos ilia scio, ĉar ni ĉiuj senescepte estas stultuloj. Ili ĉiuj, kaj la neatentema astronomo, kaj la sensperta sorĉisto, kaj la kverelema gardanto de scioj donos al mi informon, sperton, kolorojn kaj dimensiojn. Kaj se subite ili ĉiuj faros belan rektan vicon, ekridetos, vestiĝos rozkoloro kaj profesie ekdancos antaŭ mi amuzan kvadrilon – tio ja estos agrable por mi, sed kion ja mi ricevos? Du-dimensian falsaĵon. Ne forprenu de mi mian tri-dimensian Esperantujojn!

Junuloj ŝatas drinki, danci kaj flirti. Bone, mi eĉ konsentu. Sed estas, laŭ mi, egala ebleco trovi ĝojan drinkemulon, dancemulon kaj flirtemulon inter homoj de ajna aĝo, same kiel homon kun samaj literaturaj, muzikaj gustoj, vivfilozofio ktp. La malsameco inter junulo kaj homo aĝa, la diferenco kiu laŭ ies opinio malfaciligas komunikadon dum UK-oj, estas ne tio. La





problemo de junulo ne estas tio, ke plenkreskuloj ne subtenas liajn gustojn, sed tio ke, vundebla kaj flamanta, li plenkore ardas esti akceptita. Tiu stato ja bedaŭrinde malaperas kun la paso de la jaroj, sed ne malaperas la kapablo akcepti.

Oni tro multe parolas en Esperantujo pri “obstinaj baroj”. Interkompreniĝemo, kunpuŝanta homojn el diversaj mondopartoj, kulturoj kaj religioj, estas la bazo de Esperanto, tio estas tro evidenta, mi ne reparolu pri tio. Ankaŭ komprenemo seksa kaj genra estas vaste diskutata kaj prilumata en Esperantujo nun. “Homoj kun homoj”, ĉu? Sed iu el la baroj tamen restas – aĝo. Ĉu vere ni devas havi renkontiĝojn por junuloj kaj por maljunuloj? Kial ne por viroj kaj virinoj aparte? Sed ja “homoj kun homoj”... Mi estas homo el lando multpopola kaj multreligia, el lando kun relative sufiĉa genra egaleco, sed el lando kie la Problemo De Patroj kaj Filoj estas aksiomo, neniu eĉ imagas, ke ĉi tie eblas trovi interkomprenon. Do miaj “obstinaj baroj” estas tiaj. Kaj ili falis en Esperantujo por mi.

Mia dua Esperanto-renkontiĝo kaj por ĉiam la plej kara por mia koro, estis Internacia Festivalo, novjara aranĝo, kie krom du-tri homoj ĉiuj estis pli-malpli trioble pli aĝaj ol mi. Kaj, interalie kompare kun IJK, ili dancis kaj drinkis multe pli sperte kaj, do, sufiĉe pli multe. :-)

Drinki, danci, flirti... Ĉu vere por multaj homoj



ekzistas sufiĉe firmaj baroj malpermesantaj fari tion ekster Esperantujo? Por kio ĉi tie estas bezonata Esperantujo, mondo sen limoj, sen limoj multe pli gravaj kaj nevenkeblaj socie kaj psikologie por ajna homo, ol iuj etaj etikaj nuancoj rilate al trodrinkado kaj flirtumado? Mi ne parolu pri ĉiuj landoj, sed en grandega parto de ili ni ĉiuj drinkas, dancadas, etosumadas kaj flirtas ajnkulube. Sed nur en Esperantujo mi, juna virino el Rusio povas babili kun trioble pli aĝa viro, sciencisto el Japanio, pridiskutante librojn, kiujn ni ambaŭ estonte deziras verki. Tion vere malfacilas trovi ekster Esperantujo.

“Por dancadi la Bambon”...

Ĉu estas ĉi tie iu, kiu ne ŝatas la Bambon? “Por dancadi la Bambon (...) mi fariĝos mar...esperantisto, se volas vi, se volas vi”. Dum la UK en Lisbono oni dancis la plej grandan, amasan kaj buntan Bambon, kiun mi iam vidis. La sekva laŭ grandeco estis tiu dum la UK en Nitro. En unu rondodanco mi kontraŭ brila sceneja lumo vidas vizaĝojn de homoj, kun kiu ligis min dekoj da diversaj, tre diversaj Esperanto-renkontiĝoj tra la tuta mondo, sed unuafoje tiel kune, en unu rondo: jen estas nepalanino, kun kiu ni post la balo perdiĝis en nokta Seulo dum UK; jen estas viro, kiu unuafoje en mia vivo frazon post frazo tradukis miajn prelegojn de Esperanto al la finna por finna publiko, jen estas sciencisto, kies prelegojn mi arde ŝategis dum BET... Ili estas centoj, samtempe, unuloke. Ĉu ankaŭ tiuj, kiuj neniam plu dancos kun ni, aŭ estas nur mensogo de lumo?

verkis **Anna Striganova**




Fonto: <https://www.liberafolio.org/2018/10/14/kial-mi-partoprenos-uk-ojn/>

Rompita Flugado

Birdo flugilojn etendas
kontraŭ la vento.
Alten, pli alten,
en la senliman lazuron.
Kia plezuro!...

Sed loĝas ĝi sur la tero:
tie spionas danĝero.
Pafo. Vunditaj flugiloj.

Surteriĝo. Trista krio...
Ploras la ĉiel' pro afer'
de la kruela ĉasisto.



Verkis **Gersi Bays**, el Brazilio
laŭ esejo de Elena Popova el
Bulgario

sendis **Elena Popova**, el Bulgario

poemo de Gersi Bays



Tre ofte mi pensas pri la forto kiun havas la amo, ne nur sur la homoj, sed sur ĉiu naturaĵo. Eble ŝajnos al kelkaj legantoj stranga mia kredo, ke la amo influas la prosperon de la plantoj, tamen mi havas pruvon, mi memoras mian patron, kiu havis multajn florphantojn en sia korto, plantojn kun ĉiam brilaj folioj kaj belegaj, diverskoloraj floroj. Li havis ankaŭ plantojn belodorajn, kiuj ne nur plenigis la korton sed grimpis kaj kovris la murojn, atingis la tegolojn de la tegmento. Mia patro pasigis sian liberan tempon en tiu sia paradizo, flegante siajn amatajn plantojn. Li ne nur pioĉetis kaj akvis ilin, sed karese li senpolvigis aŭ lavetis per mola tolaĵo iliajn foliojn kaj farante tion li murmuretis, jes, li kviete parolis al ili! Iam mi demandis lin kion li diras al la plantoj kaj li tute simple rerspondis "ke ili estas belegaj, ke mi amas ilin multe!".



Mi memoris tiujn malnovajn, belajn scenojn, hodiaŭ, kiam mi decidis rakonti la belan historion de Akamaso, Filisa kaj Demofono.

Demofono kaj Akamaso estis fratoj, reĝidoj, filoj

de Tezeo (Θησεύς), la potenca reĝo de la glora Ateno (Αθήναι).

Kiam Dioskuroj (Διόσκουροι), la ĝemelaj reĝidoj de Sparto (Σπάρτη), surprize agresis Atenon por elliberigi sian forrabitan de Tezeo fratino, la atena reĝo estis en ekspedicio, malproksime de sia lando. Tiele, Dioskuroj tre facile venkis la kontraŭstarintan malmultenombrian atenan armeon, ili plenumis sian celon kaj foririnte lasis la regadon de Ateno en la manojn de Menesteo (Μενεσθεύς), politika kontraŭulo de Tezeo. Tiam, la reĝidoj, por eviti la areston, per nun kelkaj ŝipoj kaj kun malmultenombra armeo el elektitaj fidelaj militistoj, rifuĝis en la insulo Eŭbeo (Εύβοια). Ili restis tie ĝis kiam ilia patro revenis, reakiris sian tronon kaj komisiis al siaj filoj komandi kaj konduki sian atenan armeon al la granda tuthelena militiro kontraŭ Trojo (Τροία).

En la daŭro de la dekjara, kruela milito, la junaj armeestroj partoprenis centojn da bataloj, en kiuj ili sukcese frontis al tre fortaj kaj renomaj kontraŭuloj. Tiele ili gajnis la admiron kaj estimon de la ceteraj, multe pli maljunaj, spertaj kaj gloraj helenaj militestroj.

Ŝajnas ke Akamaso estis pli lerta batalanto kaj tion montras la fakto, ke li estis inter la elektitaj malmultaj armitoj, kiuj eniĝis en la Lignan Ĉevalon (Δούρειος Ίππος) kaj la unuaj eniris en la trojan ĉefurbon kaj agresis la reĝan palacon.



Notinda estas tio, ke post la definitiva plej kruela batalo, la du atenaj reĝidoj, zorgante pri la disigado de la kaptitaj en la troja palaco personoj, ekvidis inter la servistoj kaj rekonis sian avinon Etran (Αίθρα), kiu, antaŭ multaj jaroj estis kaptita kaj sklavigita de Dioskuroj, kiam tiuj lastaj atakis Atenon por elliberigi Helenan (Ελένη). Ekde tiam, la malfeliĉa reĝpatrino iĝis servistino de Helena kaj devige sekvis ŝin en Trojo. Kompreneble sekvis tre emociaj scenoj, kiam la maljunulino troviĝis en la brakojn de siaj nepoj.

Kiam ĉio estis finita kaj ĉiu devo de la militestroj estis plenumita, la helenaj armeoj, la unu post la alia, komencis foriri de Trojo. Kiam ĉio estis preta, ankaŭ la atena armeo ekiris per siaj malmultaj ŝipoj. Post kelktaga ŝipirado, por eviti danĝere malbonan veteron, la ŝiparo devige alboriĝis apud Bizaltio (Βισαλτία), granda urbo situanta ĉe la estuaro de la granda rivero Strimono (Στρυμών). La loka reĝo bonakceptis la Atenanojn kaj tre volonte kaj doneme oferis al ili protekton kaj malavaran gastigadon, eĉ akceptinte la reĝidojn kaj la plej altrangajn ties oficirojn en sia palaco.

La bonkora kaj gastama reĝo havis nur unu filinon. Estis Filisa, junulino same bonkora kaj afabla kaj precipe treege bela. La vetero ne bliboniĝis kaj la tempo pasis en medio kaj etoso tre agrabla por la atenaj reĝidoj, kiuj ne restis longe neinfluitaj de la nerezistebla ĉarmo de la bela Filisa. Ambaŭ junuloj post nelonge enamiĝis al ŝi, tamen la unu diris nenion al la alia pri la afero. Post kelkaj monatoj, Demofono, la pli maljuna reĝido, kiu kompreneble havis la plej gravan rolon kaj devon al la regaferoj de la patrujo, decidis ordoni la foriron. Antaŭ tio, li trovis la okazon konfesi al Filisa sian amon kaj li promesis al ŝi, ke post kiam li reguligos la ŝtatajn aferojn, tuj kiam la cirkonstancoj estos favoraj, li nepre revenos por edziĝi kun ŝi kaj ŝin preni kun si en Ateno.

Kontraŭe, Akamaso, kiu estis tute libera elekti sian vojon, decidis pluigi sian restadon en Bizaltio, do li ne foriris kun sia frato, li preferis resti apud sia amatino. La tempo montris ke li faris tre bone, ĉar Filisa, post nelonge akceptis la belan junulon en sia brakumo kaj tuj poste en sia dormoĉambro.



Post iom da tempo la kuniĝo de la amorantoj donis frukton, Filisa gravediĝis kaj ŝia patro, la bonkora reĝo, decidis ne nur edzinigi sian filinon kun la atena reĝido, sed oferi al sia bofilo sian kronon, la reĝadon de sia lando. La amhistorio de la bonsorta paro havis feliĉan finon; la unuan filon sekvis baldaŭ la dua, la nova reĝo estis je ĉio kapabla, bona kaj amata de la popolo. En la

reĝa familio kaj en la tuta lando regis konkordo, harmonio, feliĉo. Filisa elmontriĝis virino ardtemperatura, ŝi amis kun eksterordinara pasio sian edzon kaj, kvazaŭ regata kaj turmentata de malbona antaŭsento, ŝi deziris esti kiel eble plej apude al li.

Akamaso, kompreneble, ĝuadis per sia tuta animo la amon kaj feliĉon kiuj estis abunde oferitaj al li, tamen post la unuaj du jaroj li komencis senti nostalgion pri sia patrujo. Kiam tiu sento tute konkeris lin, iĝis evidente, ke la reĝo estis perdinta sian antaŭan gajecon, ke ofte li ŝajnis nevigla, eĉ melankolia. Kompreneble, Filisa estis la unua kiu rimarkis la ŝanĝiĝon de la humoro de sia edzo. Kiel eble plej delikate, diskrete, tenere ŝi klopodis eltiri de sia edzo la sekreton kiu igis lin malfeliĉa. Akamaso diris nenion, li ne malkovris siajn sentojn, tamen, ĉiuj scias, ke ekde tiuj prajaj tempoj, ĝis nun, la virina, persista sed tenera puŝado, akompanata de kisoj, karesoj kaj larmoj, estas forto nevenkebla. Do, Akamaso rezistis, sed iam cedis kaj malkovris al sia edzino sian sopiron al sia patrujo. Filisa klopodis kiel eble delikate trakti la neatenditan familian krizon, ŝi deziris eviti foriron de ŝia edzo, ŝia arda amo postulis ke ŝi tenu lin apud si, tamen la sama sento ne permesis al ŝi igi lin malfeliĉa. Fine, kun doloro ŝi konsentis kun sia edzo, ke li vojaĝu al Ateno, restu tie kelkan tempon kaj revenu apud sia edzino kaj familio. La geedzoj kune kalkulis la tempon bezonatan por la irado kaj la reveno, tiun de la restado, tiun de eventualaj neantaŭviditaj obstakloj, kaj kune difinis la plej foran daton, en kiu Akamaso nepre devus esti reveninta. La lastan momenton antaŭ la ekiro, Filisa donis al Akamaso malgrandan skatolon kaj petis ke li malfermu ĝin nur se li konstatos ke pro ia ajn neatendita, nesuperebla malhelpo li ne povos reveni hejmen. Ŝi eksplikis, ke en la skatoleteto estis ia ŝia sanktofero al Rea (Ρέα), la patrino de ĉiuj dioj. Akamaso foriris kaj post kelka tempo Filisa,

baraktante kontraŭ la plej nigraj pensoj, en plena maltrankvilo kaj ĉagreno, komencis ĉiuvespere iris sur apudmara altaĵo kie dum horoj atendis, esperante ke ŝi ekdistingos la velon de la ŝipo de sia revenanta, adorata edzo.

Post kelktaga navigado, Akamaso renkontis ŝtormon. Lia ŝipo, batata de altaj, fortaj ondoj kaj tempestaj ventoj, post nelonge restis nestirebla. La unu post la alia la sekvantoj de Akamaso perdiĝis kaj li estis la sola kiu saviĝis, elĵetita sur dezerta, kruda bordo de la malproksima Cipro (Κύπρος). La loko en kiu li estis ĵetita estis sovaĝa, dezerta, senhoma. Akamaso estis vundita, tute senhelpa, do, pasis longa tempo ĝis kiam li povis iom libere stari kaj piediri, por serĉi pri homoj kaj helpo. Kiam oni trovis lin, li estis tre senforta, tre malsana, senkonscia. Li estis longe flegita, ĝis kiam li tute resaniĝis kaj nur tiam li konsciis ke la tempo, ke la antaŭdifinita limdato de lia reveno estis antaŭ longe pasinta. Tiam li ekmemoris la skatolon de Filisa, li sciis, ke, laŭ sia promeso, li devis ĝin malfermi, do, kun peza koro li tion faris, li premis, puŝis, levis la kovrilon kaj tiam, subite, nigra, kvazaŭ fuma, ombro de terura fantomo elĵetiĝis supren! Akamaso surpriziĝis, forte ektimis, forĵetis la skatolon kaj instinkte kuris foren, li saltis sur sian ĉevalon, li forte ekspronis ĝin, kaj tiam, la ĉevalo, surprizite, sovaĝiĝis, ĝi eksaltis sur la du piedoj, ĝi forĵetis de si la rajdanton. Akamaso falis, kaj tute strange, li falis sur sian propran glavon, kiu trapikis lin en la brusto!

Akamaso tiamaniere mortis kaj la homoj diradis, ke la skatolo kaj la fantomo estis nenio alia ol ia magiaĵo, malbeno de Filisa, celanta puni eventualan perfidon de sia edzo. Ŝajnas al mi, ke tio povus esti vera, ĉar ĉiuj scias, ke la arda amo, perfidata, ofte ŝanĝiĝas al flama malamo!

Dume, en Bizaltio, Filisa, batalante kontraŭ sia despero, kontraŭ sia netolerebla ĉagreno, kontraŭ sia pli kaj pli profunda malfeliĉo, nombris kaj renombris la tagojn, eĉ post la paso de la difinita revendato. Ĉiutage, longe staris sur la altaĵo, senlace observadis la maron, ŝi atendis, ŝi suferis doloron vere neelteneblan, do, unu tagon, tie, sur la altaĵo de sia atendado, Filisa, en stato de neeltenebla malespero, sin pendumis de alta arbo!

Estis nepriskribebla dramo! Ŝiaj nekonsoleblaj gepatroj, ŝiaj parencoj, ŝiaj geamikoj, la tuta popolo, en profunda funebro, enterigis en tiu punkto, sub la fatala arbo, la bonkoran, tre amatan reĝinon, kaj, tuj post la fino de la enterigo, mirakle, antaŭ la okuloj de centoj da miraj homoj, subite la folioj de la granda arbo komencis fali, ĝis kiam ĝi restis tute nuda je verdaĵo. La printempo pasis, venis nova kaj pasis, tamen la arbo ne plu elkreskigis foliojn, ĝi restis por



ĉiam nuda, mortinta.

Tamen, tio ne estas la fino de nia historio, en tiu ĉi dramo estas unu ankoraŭ protagonisto,

estas Demofono. La saĝa, pli maljuna frato, reveninte en Ateno troviĝis antaŭ tre gravaj aferoj kaj problemoj. Lia patro mortis kaj li iĝis reĝo, do, li devis multon fari por remeti ordon en la komplikajn aferojn de la granda reĝlando. Ĉio tio ĉi tenis lin okupita sufiĉe longe, tamen li neniam forgesis sian promeson donitan al la malproksima reĝidino, kiun li neniam ĉesis memori kaj ami pasie. Dum kelkaj jaroj lia korpo estis en Ateno, sed lia animo restis en Bizaltio, ĉe la amata virino. Demofono, kredis, ke Filisa atendis lin, do, kiam la ŝtataj aferoj estis metitaj en glatan vojon, li decidis fari la vojaĝon, celante edziĝi kun Filisa kaj igi ŝin reĝino de Ateno. Li plenigis sian ŝipon per reĝdecaj donacoj

kaj kun neretenebla senpacienco ekiris. Li atingis Bizaltion, sed tie atendis lin la plej doloriga senluziigo. La tuta vero prezentita al li lin skuis forte, tamen ne moderigis lian amon al la perdita virino. Oni kondukis lin ĉe la tombo de Filisa kaj tie Demofono ne povis reteni siajn larmojn. Kiam oni montris al li la arbon de kiu Filisa estis sin penduminta, Demofono, plorante brakumis la trunkon. Tiam, antaŭ la okuloj de multaj homoj, mirakle, la arbo elkreskigis subite freŝajn, tute verdajn branĉojn kaj foliojn kaj prezentiĝis kovrita de neordinare brila verdaĵo!

Jen, do, estas ankoraŭfoje pruvite, ke la amo, la tute sincera, pura, forta amo, venkas ĉion, eĉ la morton ĝi venkas; kaj jen kial la plantoj de mia patro estis ĉiam freŝaj kaj vivaj!

La antikvuloj diradis ke ĝis tiam la helenoj nomis la foliojn "petaloj" (πέταλα), sed post tiu okaĵazo, el la nomo de Filisa ili donis al ili la nomon "fila" (φύλλα).

Pri Demofono la tradicio diras, ke li vivis longe, en prospero kaj gloro, ke li estis reĝo dum preskaŭ tridek jaroj.

verkis **Spiros Sarafian**, el Grekujo

Multaj vojoj kaj unu falo

Rakonto de Adil Olluri, el Albanujo

Drin Morina, diplomita pri la albana lingvo antaŭ kvar jaroj, decidis longe promeni tra ĉiuj stratoj de Prishtina*. Sen iu ajn limo, sen iu ajn celo por ie halti aŭ por iun renkonti. Tiel, sola, ignorante iun ajn, li ordonis siajn piedojn ke, per malrapidaj paŝoj, trairu la urbon randranden, ne pro nostalgio por admiri la malmultajn ties belaĵojn kaj multajn malbelaĵojn, sed kvazaŭ pro spirita bezono por paŝadi kaj nur paŝadi.

Dum ĉi tiu kelkhora marŝado, ĉe lia kapo vagadis tre variaj ideoj, jen terure mortoallogaj kaj jen bondeziraj kaj vivodonaj, kvankam dominantis ja la unuaj. Tiel, dum tiu paŝado tra la pulvorizitaj stratoj de la urbo, aperis antaŭ siaj okuloj, ĝisdetale, la aspektoj de la kvar jaroj de lia studenta vivo, dum kiuj li pli suferis ol amuziĝis, daŭre ignorita de virinoj, kiuj plaĉis al li, neatentita en la sociaj kunsidoj, organizitaj de liaj kolegoj, kie oni ofte lin eĉ ne invitis. Ne rarofoje, li estis ofendita de profesoroj kaj asistantoj, aparte de ĉi tiuj lastaj, kiuj scipovis fariĝi pli snobaj ol iliaj superuloj, kun kiuj li neniam sukcesis kondukti laŭkonvene aŭ kiel ili deziris, kaj tio subkomprenis koletendiĝon kaj humilecon al ili ĝisĝene. Tiuj bonkonduktaj reguloj, inventitaj de la plej gravaj beletruloj, estis naŭzintaj al li la studojn kaj multajn siajn kolegojn, kiuj ĉiamfoje

tradukis kaj sendis Bardhyl Selimi, el Albanujo

obeis kaj pretpretis por preparolaĉoj.

Li memoris venĝeme ankaŭ la studentajn organizaĵojn, tiujn klubojn de kanajloj. Ili ekspluatis lin kontinue por kompili la ties paroladojn kaj similajn eseojn por la partioj, per kiuj ili trompis la studentojn. Li sentiĝis malbone, humiligita ĝisoste, ĉar komplicis en evidenta mensogaĵo kreinta iluzion, kiun estas kredinta multaj liaj kolegoj. Li malamis ĉi tiujn idiotajn cirklojn, trompantaj studentojn, aparte la junajn studentinojn.

Dum la paŝado tra la kvartalo de Suna Bordo, li rememoris pri Arjeta, knabino kiu ankoraŭ loĝis en ĉi tiu urba parto, al kiu li estis fiksita ekde la unua lerneja duonjaro, kiam li ankoraŭ sin sentis fremdulon en tiu loko. Ŝi estis la flirtema nigraokulino de la generacio, kies anĝeleca vizaĝo kaj rideto brilis de tago al tago, kio povus tremigi la korkordojn de ĉiu masklo. Ŝi estis rifuzinta plurfoje Drin-on, ĉar ŝi estis freneze enamiĝinta al altstatura asistanto de la Malnova Beletro, kies flirtan kun li jam sciis preskaŭ ĉiuj. Tio estis spirite lezinta la junan studenton, kiu tiutempe, longajn tagojn, apenaŭ estis dorminta.

Samtiel, malsuprenirante je direkto al la studentaj domoj, li rememoris pri ka blukulino Majlinda, post kiu ŝi estis kurinta longajn jarojn, sed en la momenteto de reala proksimiĝo, en ŝia vivo ekaperis kalva viro, ĉirkaŭ tridekjara, posedinta unu el la plej belaj kafejoj



de la urbo. Tio ege moligis lin tutan, estis disverŝinta la ties menson kaj estis perdiginta la ties koncentriĝon. Igis lin senti sin tiel negrava, kiel senvolonta, kreante konvinkon ke li nenion povus fari kaj neniam sukcesus realigi tion, kion li deziras. Igis lin senti sin kvazaŭ senvalora estaĵo, kio envane ombrigis surteren.

Drin Morina rememoris ankaŭ tiujn malmultajn momentetojn, kiam liaj kolegoj parolis pri naŭza bonkondukteco, precipe dum la ekzamena sesio aŭ pli precize, unu tagon antaŭ ili, aŭ nur en la ties tago, ĉar li estis la plej saĝa kaj la plimulto apenaŭ disiĝis disde li, kvazaŭ ksodoj dum la somera pinhoru. Estis ĉi momentetoj, kiam li estis la plej adorata de la generacio, plej karesata, plej kontaktata. Li sentis sin mastro tiujn horojn kaj kondukis al ili kvazaŭ kapo, deziranta venĝi kontraŭ ilin pro tiuj monatoj kaj aliaj semajnoj, kiam ili hezitis eĉ lin saluti.

Li bone jam sciis ke ili, dum tiuj timigaj minutoj pro malsukceso, false kompilis por li gloraĵojn kaj ne ŝparis por li bondezirojn. Tamen, li sentis sin bone per ĉi tiu iluzio, kiu vigligis lin kaj igis lin pli forta en la sino de tiuj ignoruloj, kiuj eĉ la kvinpaĝajn skribaĵojn apenaŭ povus tralegi.

Li, je sia malbona sorto, posedis ankaŭ alian nekovreblan handikapon, kaŭzita dum lia frua infanaĝo. Dum lia patrino, iun ordinaran dimanĉon, kuiris per la forno funkciinta per fajroligno, en iu malatenta momenteto, estis lasinta trijaran knabon alproksimiĝi kaj ĉi tiu, ludante, estis falinta sur la karbardaĵaron plene de varmegaj karbardaĵoj. Bruliĝis terure la maldekstra vango de lia delikata infana vizaĝo, lezante la ties haŭton ĝisprofunde. Ekde tiu tago, postrestis ĉe li travidebla stigmato sur tiu vango. La gepatroj estis malriĉaj kaj ne eblis, nek ili estis helpataj de kelkiu por la konvena operacio, tiel, ĉe li postrestis la malbela makulo survizaĝe.

Ofte mi pensadis, kvankam neniam tion aldiris lin kelkiu, ke eble pro tiu stigmato la knabinoj lin rifuzis kaj la kolegoj lin ignoris, ne akceptis lin en iliaj liberaj konversacioj, krom tiuj koncernantaj la prelegojn kaj notojn de ili bezonataj. Tiu signo deforminta la duonon de lia vizaĝo kaj ŝajniginte lin kvazaŭ sepdekjarulon, certe malhelpis lin dum la akompanoj, precipe kun la bela sekso, sed neniam malhelpis lin sukcesi en la ekzamenoj, kiujn li transpasis ĉiujn ene de la regula limdato.

La legado fariĝis por li la sola konsolado. Iĝis ĝi ia terapio por kunfronti la multajn ĉiutagajn krampfojn.

La kondiĉoj de malhavo de mono, tiel necesa por junulo, kiu bezonis travivi la noviajn eventojn kaj la nekonataĵojn deziritajn, certe por li tre multekostajn, igis lin pli enpremita en la realigo de siaj deziro

ĉiutagaj. Similajn problemojn, pli malpli, havis ankaŭ multaj el siaj kolegoj, sed la sia estis ja plej unika kaj plej suferiga, ĉar li devus nombri bone ĉiun centonon. Lia patro, iamtempe kapabla konstruisto, el la plej bonaj en ties vilaĝo kaj pli vaste, ne plu povis manlabori. Ekde kvar jaroj, li estis paralizita, ĉar, pro akcidento li estis grave fal-lezita de la kulmino de iu domo. Lia patrino estis kamparanino kaj ne kapablis fari iun laboron, dum la fratoj liaj estis malpli aĝaj. Nur la avo donis lin monon, dividante parton el la malgranda ties pensio por li, fojfoje ankaŭ la onklo, stratpolicisto.

Lia avo, Halit Morina, estis tre ligita al la plej aĝa nepo kaj volis ke li, je ajna kondiĉo, finstudu en la fakultato, ne konsiderante la materiajn problemojn de la familio. Li ege kompatis sian filon restinta en tiu malbona sanstato; li ne povis prizorgi kaj kreskigi mem la ties birdojn, kiel mem sin esprimis, sed ege kuraĝiĝis de la nepo, kiun li daŭre vidis legi. Konvinkite ke li amis la lernejon, s-ro Halit ĉiufoje ne aĉetis la duonon de la medikamentoj preskribitaj de sia kuracisto, ĉar li suferis pro prostatato kaj enspiraj malregulaĵoj. Tion li faris nurnure por ŝpari monon por ke Drin vojaĝu de la vilaĝo al la ĉefurbo, kvankam tion Drin ne povus fari ĉiutage. Ĝuste pro tio, multaj lecionojn li ne havis eblecon aŭskulti.

Iun aŭgustan matenon, ankoraŭ ne tagiĝis, kiam la avo eniris la senrevenan vojon, adiaŭante definitive al sia vivo. Ne suferante surlite longajn semajnoj, monatojn aŭ jarojn, kiel tio okazis al multaj aliaj maljunuloj, li estis mortinta tutkviete, tiel, kiel li vivis dum sepdek ok jaroj, ĉiam trankvila kaj ĝentila. La morto de la avo estis skuinta lin spirite, tiel, kiel li, tutan tempon de la entombigo, ploradis, ne kredante ke la avo jam mortis kaj ne plu atendus lin ĉiutage ĉe la sojlo de la domo, kiomfoje li revenis el Prishtina. Ne konvinkiĝis li ke la avo neniam plu aldemandus pri tio, kio okazis en la ĉefcentro, "kio nova el la urbego", kiel kutimis diri la forpasinto kaj ĉu li faris jam "iun signon" al iu knabino, estonta junedzino.

Drin, la plej splendida studento de sia generacio, por plustudi, ofte bezonis labori kiel noktogardisto en iu privata entrepreno aŭ en iu riĉula domo, ĉar li, tiujn jarojn, klopodegis por elteni ankaŭ la familion. Endungite, li pensis ke li trovis la ĝustan solvon, ĉar la enspezita mono, kvankam malgranda, eltenis sian kvinmembran familion, dum per la ĉiujara stipendio li pagis por la studado.

La junulo, Drin Morina, laboris provizore kiel gardisto dum longaj monatoj, depende de la kontrakto kun la dungantoj; li sin pretigis por la ekzamenoj, legante preskaŭ tutan nokton, kio kaŭzis ne rarfoje ankaŭ maldungon fare de siaj superuloj, kiuj pensis ke

li malatentis la deĵoron.

Alvenis la multeatendita momenteto kaj li akiris la diplomon; nun brilis ĉe li la ĉarmo, feliĉiĝis li kvazaŭ la infano kiam ricevas dolĉaĵojn de la plenkreskuloj. Tutsame sin sentis la ĵusdiplomito Drin, pensante ke nun malfermiĝis pordo, tra kiu li povus eniri en la grandan mondon, kiu alportus lin dignan laborpostenon, tiel kiel li ja meritis. Tio, por siaj gepatroj estis la plej bela novaĵo, ricevita dum dek lastaj jaroj de ilia vivo, plenigita je malĝojoj kaj suferajoj, sen aliaj okazaĵoj kaj travivaĵoj, kiuj igus ilin feliĉaj. Povraj gepatroj, en ilia vivo estis tre malmulte da eventoj, pri kiuj ili parolis substrekante bonan senton, tiel ke la tuta ilia tridekjara geedza vivo povus resumiĝi en nur du punktoj, nuptofesto kaj nasko de filoj.

Drin Morina komencis trovi laboron. Li aplikis en la unua konkurso, pri kio li estis leginta sur la ĵurnalo, liverante ĝojplene la falditajn kaj atenteme envolvitajn dokumentojn. Li estis ekzaltita la tuta, kiam oni invitis lin en la unua intervjuo, ĉar li imagis sin jam endungita. Sed ne okazis tiel, kaj li daŭre, longajn monatojn, intervjuiĝis; oni diris ke li estis inkluzivita en la malvasta nomlisto, kaj fojfoje en la plej malvasta nomlisto. Nenion pli. Dum la unuaj monatoj li ne estis multe ĉagrenita, ĝiskiam pasis tuta jaro ekde la diplomiĝo..

Senvole, li estis devigita reveni al la deĵorado farita dum la studentaj jaroj. Liaj amikoj estis dirintaj al li, ke li fariĝu parto de la partio de la plej fortaj homoj, kiu posedis aŭ posedus baldaŭ la ŝtatpotencon ankoraŭ dum la venontaj dudek jaroj, kiel sola ebleco por kapti valorindan laborpostenon. La bezonanta junulo estis akceptinta iliajn konsilojn, tamen li ne sukcesis pluresti apud la ŝtataj fortuloj pli ol ses monatojn. Li ege estis ĝenata pro la fakto ke li, ĉiusemajne, devus brodi kompilaĵon por la fakestro, kiu pagis lin tre malmulte, kvankam per tiuj skribaĵoj, lastajn monatojn, la ĉefo estis fariĝinta unu el la plej respektataj publicistoj enlande. La premon de la ĉiusemajna skribaĵo li povus tamen elteni iel, sed li ne povus pardoni al la estro la jenan malican mensogaĵon kaj tiun naŭzan trompaĵon: La ĉefo estis promesinte al Drin, dum sinsekvaj kvar monatoj, ke li estis kontinue klopodante ke Drin kaj la ties asistantino plej intime ligiĝu, ĉar ŝi estis ja saĝa knabino, konvena por Drin. Kaj, iutage, tute hazarde, Drin estis kaptinte la ĉefon "kun la ĉevalino enmane"! Ekde tiu tago li ne akceptis pluresti apud la partio de plej fortaj, kio, deekstere, aspektis mola kiel la kotono.

Li havis nenion alian fari, krom reveni al la konkursoj kaj aplikadoj. Denove same, postlasinte malantaŭen la plilarĝan nomliston, sed neniam

enirinte en la plej malvasta nomlisto. Hodiaŭ, en ĉi tiu tago de sencela vojaĝado, estiĝas du jaroj, kvin monatoj kaj deksep tagoj ke oni diradas lin la samajn kozojn, ne ŝanĝante eĉ unu vorton, ankaŭ unu komon. Li sentiĝis terure senesperigita, timegige seniluziigita, aparte en la kazoj, kiam, anstataŭ lin, oni dungis la eksajn liajn kolegojn, kiujn li helpis por transpasi la ekzamenojn. La fino de la mondo estis por li, kiam oni dungis Astrit-on, anstataŭ lin, al kiu li estis helpinta ne nur finstudi, sed ankaŭ li estis pleniginta la aplikan formularon, dum mem li devus daŭrigi laboron, jen kiel gardisto, jen kiel vendisto en la memservaj entreprenoj kaj jen kiel parko-ĝardenisto.

Li memoris pri ĉiuj travivitaj kozo dum sia paŝado tra la placo kun marmoraj platoj de la ĉefurbo, ekde la virinoj, ignorado, malatentemo de la sciuloj, al kiuj li ne scipovis humiliĝi, manko de mono, morto de avo kaj multaj aliaj okazaĵoj, kiuj igis lin ĉi tagojn sin senti malbone. Li konsideris sin kulpulo por la morto de la avo, ĉar li sciigis ke la avo, pro li, ne aĉetis siajn medikamentojn, kaj eble la avo pluvivus, se li ne farus tion. Ho, se li povus aldiri per sia buŝo ke ne indus tio por diplomo senvalora.

Hodiaŭ li sentis sin tiel multe ĉagrenita! Malespere li estis vivinta ok jarojn, sed hodiaŭ tio transformiĝis en profundan kaj timegigan ansion, kiel neniam kaj nenutage antaŭe. En tiu ĉi malagrabra tago, li estis plene subigita de tiaj pensoj, kondiĉe ĝis la eskrema direkto de la dilemo "estu aŭ ne estu?", en tiu ĉi mondo kaj en tiu ĉi lando, kie maloportuneco estis principo por antaŭenigi la aferojn, dum la honesteco konsideriĝis io primitiva kaj danĝera, kion oni devas lukti.

Drin Morina haltis antaŭ alta domo, rigardis al la enirejo kaj supreniris perokule ĝisalte, en la pli supra etaĝo; decidis li iri tien, forkaptita de teruraj pensoj. Li volis finigi al ĉio! Li tenis la kapon alten rigardante kaj lanĉis la unuan paŝon; poste la duan kaj, ne farinte la trian, li ekrimarkis ion, elsantinta de la domopinto, trafluganta en aeron kaj pligrandiĝante rapidmaniere, enfalis antaŭ siaj piedoj. Estis tio juna knabo, kies kapo fendiĝis, kunfrapiĝante al la forta trotuaro.

tradukis **Bardhyl Selimi**, el Albanujo

* Ĉefurbo de Kosovo



likvaĵo, kiu formis la murojn. Unue li rigardis kun timego sed poste alproksimiĝis al la muro. Etendiĝante la manon li nur sentis la tuŝadon al vitra muro. Ĝuste tiam la malantaŭa muro malrapide fendiĝis kaj tra la



"Ni pardonpetas, ke ni vin tiel urĝe venigis ĉi tien." Irante li estis pasinta la informojn el la dosiero.

"Fakte mi atendis vian alvokon pli frue. Ni ĉiam estas la fina rimedo!" Lia riproĉo estis sufiĉe sentata en tiuj vortoj.

"Ni pardonpetas pro tio. Ni petis, ke vi venu. Vi eĉ devus esti ĉi tie en la unua okazaĵo. Tiu delikata..."

"Restas neniu, kiu ne scias la aferon. La tuta planedo skuiĝas. La komunikado pri la afero tiel disvastiĝis, ke oni eĉ ne povas trankviliĝi pro la vibrado. Ĉu ĝi estas sama al la alia kreitaĵo?"

"Jes. La temperaturaj valoroj, la procento de vibrado, la reagoj, ĉiuj estas la samaj, s-ro Tamblыр."

"Bone. Ĝuste tiel, kiel mi pensas. Ĝi kaptiĝis en iu el la saltopunktoj. Alie kun tia teĥnologio ĝi ne sukcesus atingi ĉi tien. Sed ni povas forlasi nun ĉi tiun diskuton."

"Vi pravas. Viajn pensojn pri tiu okazaĵo ni multfoje ekzamenis en nia memoro kaj ni opinias, ke vi pravas. Ĉi tiu kreitaĵo formiĝis el stranga konsistaĵo, integriĝis en unueco, el multeco kiu ne komprenas la senton de memo. Tre interesa!" Fakulo Sihhscl vibrigis kun ekscito.

Kiam ili haltis antaŭ la muro, kiu ŝajnis al densa likvaĵo, ili eniris interne tra la fendo kiu ekaperis en la mezo de la muro kaj kiu formiĝis pro vibrado. Iom fore videblis lumanta ĉambreto kies lumo turnis la tutan nigran ĉirkaŭaĵon al malhela ejo.

"S-ro Tamblыр, ĝuste tiel, kiel vi specifikis, ni provizis artefaritan medion kaj la kreitaĵo nun ankoraŭ vivas. Distingi la aliajn elementojn estis tre malfacila afero, ĉefe la graveco de oksigeno estis tre stranga afero por ni. Mi ne pensas, ke ĝi pluživus sen ĝi. Por ni eĉ ĝia penso estas malbona."

"Ni scias. Ĉu vi provizis por la vestaĵoj kiujn ni ordonis?" Tamblыр eligis vibradon, kiu signifis la malgravecon de tiu ĉi interparolado. La alia respondis jese kaj montris la prototipon. Tamblыр alproksimiĝis vibrante kun plezuro kaj eniris en la vestaĵon.

Doĝukan, kiam li malfermis siajn okulojn en la brile lumanta ĉambro, timis pro la stranga movo de la nigra

fendo eniris iu nigraĵo kiu similis la formon de homa korpo. La nura malsimileco estis ĝia tute glata korpo, sen okuloj, sen nazo, sen iu ajn alia ekstremaĵo, kaj tiu nigra aĵo nun estis alproksimiĝanta al li. Plue, la korpo de tiu aĵo estis eble dekoble pli granda ol la lia.

Poste li svenis pro ia granda nevidebla aeropremo venanta sur li. Kiam li denove malfermis la okulojn la stranga kreitaĵo estis kvazaŭ rigardanta al li.

"Mi pardonpetas."

Doĝukan frotis sian kapon, kiu estis doloranta pro la premo.

"Pro kio?"

La kreitaĵo iomete hezitis. Kvazaŭ pasis horoj sed poste la voĉo denove altiĝis. Sed ĉi foje ĝi estis pli malalta.

"Ni ne volis domaĝi vin."

Doĝukan tuŝis la kolumon de sia kosmovaĵo.

"Fakte mi eliris el mia orbito. La lasta afero, kiun mi memoras estis ke mi svenis. Eble vi savis min."

"Jes."

"Ĉu vi estas homo?" Doĝukan iomete alproksimiĝis al la nigra kreitaĵo sed poste haltis pro la doloro pikanta en lian kapon.

"Magneta areo. Ne alproksimiĝu. Eĉ se mia vesto malaltiĝas ĝian forton ĝi ankoraŭ estas danĝera por vi."

"Ĉu vi eligas magnetismon? Kia homo vi estas, ho, giganto?"

La kreitaĵo malproksimiĝis sufiĉe.

"Ĉu 'homo'? Do vi tiel nomas vin. Ni komprenas. Ni ne estas tia. Ĉi tiu estas vestaĵo preparita por vi. Por komunikiĝi kun vi."

"Sed kie mie estas? En kia ejo?"

"Estas malfacile diri tion. Ni ne komprenis de kie vi venis. La saltopunktoj. Ili alportis vin ĉi tie. Ĝuste tiel, kiel la alia."

"Ĉu la 'alia'?"

"Jes ĝi estis sama al vi. Sed ni ne malkovris, ke oksigeno estis tiel grava por vi. Kaj ĝi perdis sian energion."

"Kiu estas tiu alia?"

“Jen.” En la angulo de la ĉambro kreĝis vasteco kaj en ĝi ekaperis kosmoŝipo kaj apud ĝi kosmonaŭto. Doĝukan alproksimiĝis kaj haltis apud la kosmonaŭto. Ĝi estis soveta kosmoŝipo kaj kosmonaŭto.

“Do, vi rekonis ilin.”

“Ĉu vere? Kiel vi komprenas miajn pensojn?”

“La vibradoj. Mi povas percepti ilin. Mi ne scias kio estas ‘penso’ sed mi povas percepti la energiajn signalojn vi disvastigas. Mi uzas la ‘vortojn’ en via ‘cerbo’ aŭ kiel ajn vi nomas ilin.”

“Mi ne rekonis lin sed mi ja scias. Ĉi tiu estas tre malnova kosmoŝipo. Eble cent jaraĝa. Li devas esti unu el la kosmonaŭtoj perdintaj tiam.

“Via percepto pri tempo estas interesa. Do, cent jaraĝa, tamen tio okazis tre proksime al ni nuntempo. Por ni. Eble, kiel vi dirus... jes... preskaŭ antaŭ unu semajno.”

“Sed ĉi tiu estas tre primitiva teĥnologio. Kiel ĝi povas okazi?” Li rigardis ĉirkaŭen kun scivolemo.

“La saltopunkto.”

Doĝukan stumblis. Li eksidis sur la planko kaj rigardis al la giganta kreitaĵo antaŭ li.

“Mia kapo... mi havas naŭzon en mia stomako.”

La kreitaĵo retroiris al la muro. Ĝi iomete atendis kaj poste turnis sin al Doĝukan.

“La magnetismo de nia planedo malhelpas vian energian fonton. Ni ekzamenis la alian kaj ni konstruis ĉi tiun ĉambrom kaj veston. Sed ĝi ankoraŭ malhelpas vin. Estas tro da graviteco kaj vibrado.”

Doĝukan rigardis ĉirkaŭen

“Fakte...” li diris sed ekhaltis. “... estas aferoj kiujn mi ne komprenas. Ekzemple, mi reagis tre normale. Mi ne sentas maltrankviliĝon, timon aŭ ion ajn alian.”

“Ni agordis tiun. Ni tiun malkovris el niaj eksperimentoj ni faris sur la alia. Ni preparis vin per sendo de vibradoj en via supra parto, al tiu parto, kiun vi nomas ‘cerbo’. Ĉi tiu ankaŭ malhelpis vian vivenergion sed ne tiel multe. Nian planedon kovras fandiĝantaj metaloj kaj elementoj, ĉefe tio, kion vi nomas ‘fero’. Ĉio en via ĉirkaŭaĵo formiĝas el tio.”

“Bone, sed mi ne komprenas, kio vi estas?”

“Ni, ni... ĉi tio estas tre komplika afero. Kiel ni antaŭe sukcesis malkovri, vi konsistas el unuĉelaj vivaĵoj kaj bakterioj. Tio formas vian firmaĵon, vian korpon. Ĝi estas la senkonscia unueco de multeco. Sed ni, kontraŭe, ĉiu ĉelo de ni, en la senco, ke vi komprenas la signifon de “ĉelo”, estas konscia unu de la alia, ni estas la unueco de konscia multeco. Ni aspektas kiel unu vivaĵo sed konsistas de miliardoj da konsciaj vivaĵoj, kaj ni nomas nin Tamblsy. Multaj tiaj vivaĵoj kune formas urbojn. Ni ĉiuj estas interligitaj pere de reto de vibradoj ni eligas, kaj ni formas niajn urbojn eligante energion kiel viaj magnetoj eligas

magnetismon inter dorsflankaj polusoj. Jen, koncize tiel. Via ‘koro’, tiel, kiel vi nomas ĝin, nun rapidiĝis.”

“Ha, jes, mi tion sentas. Vi povas vidi min. Vi povas legi mian cerbon. Ho, ha ! kaŭh, koĥ...!” “Doĝukan apogis sin sur sia dekstra brako, kaj kliniĝis lia kapo.

“Mi volus, ke vi ne elĉerpiĝu.”

“Ne estas problemo. Mi ne sentas doloron kaj mi estas trankvila en stranga maniero.”

“Ni agordas tion. Por malaltigi vian doloron.”

“Ĉu mi povas vidi vin?”

“Ĉi tio povus domaĝi al ni.”

“Mi komprenas. Mi nun eble ŝajnas malbone kaj senhelpa.”

“Ni fakte ne povas vidi vin. Ne en la maniero ke vi pensas. Ni ne posedas la sensojn, kiujn vi posedas. Ni vibras kaj difinas aferojn pere de magnetaj ondoj. Kiel mia vesto perceptas vin, ĝuste tiel. Nur randojn kaj angulojn. Kompreneble mi perceptas ankaŭ la energion, kiun vi eligas. Via tuta energio koncentriĝas en tiu parto de via korpo, kiun vi nomas ‘cerbo’. Vi estas tre interesa speco.”

“Mi esperas, ke vi ne domaĝos mian planedon.”

“Tiu estas tre malprobable. La plejparto de ni ne povus vivi sur via planedo. Malalta graviteco, malsimila magnetismo kaj se ni konsideras vian korpon, ĉio tie domaĝus nin.”

“Sed ĝi estas tre bela.” Nun lia kapo estis sur la planko kaj rigardis al la nigra muro super li.

Subite antaŭ liaj okuloj aperis io moviĝanta, kiun formis miliardoj da moviĝantaj feraj gutoj. Kvazaŭ akvo, kiu fluas malrapide kaj ĝiaj ekstremoj estis ondiĝantaj de flanko al flanko. Sed ĝuste tiam ĝiaj randoj komenciĝis bruniĝi.

“Ĉu tiu estas vi?” li diris kaj ridetis, sed la kreitaĵo, kiu nun estis alproksimiĝanta al li estis pli kaj pli bruniĝanta.

“Jes” diris la giganta kreitaĵo kun dolorplena vibrado.

Doĝukan kvazaŭ sentis la vibradon kaj rigardis al la kreitaĵo.

“Oksidado. Vi oksidiĝas!” diris kaj silentis antaŭ ol sia lasta spiro.

verkis **Kenan Çetinkaya**, el Turkujo

Unua premio de mallongaj rakontoj en la “2-a Konkurso de Loka Sciencfikcio Leviĝas”
tradukis **Vasil Kadifeli**, el Turkujo

Fonto: **Bilimkurgu Öykü Seçkisi 2018** - Yerli Bilimkurgu Yükseliyor , p.244-246
Bildo desegnita de: **Sezai Özden**

DUA PARTO - LA VIVO



53

**Se oni vere scias, kion tio signifas,
vivi en la granda TAŬO,
tiukaze estas unue la negocemo,
kiun oni tiom timas.
Kie la grandaj stratoj estas grandaj kaj
ebenaj,
sed la popolo ŝatas flankvojojn;
kie la kortegaj leĝoj estas severaj,
sed la kampoj plenaj de fiherboj;
kie la grenejoj estas tute malplenaj,
sed la vestoj elegantaj kaj pompa;
kie ĉiu portas akran glavon ĉezone,
kie oni estas tro elektema pri manĝo kaj
trinkaĵoj**

**kaj posedoj estas abunde:
jen regas konfuziĝo, ne regado.**

Rimarko de Cezar

Mi ĵus legis matene en gazeto, ke la plej multekosta diamanto tutmonde momente estas ofertata por 56 milionojn da eŭroj. Mi pensis tuj: "Kiom da homoj oni povus nutri kun tiu sumo, kiom da domoj oni povus konstrui por senhejmuloj." Do: ankaŭ ni ofte vivas nur en konfuziĝo kaj ne estas vere regata sed nur subigata. Ĉar vera regado ne permesus, ĉielkriantan povrecon apud arogantega luksego. Luksego surbaze de povreco estas krimo kontraŭ la malriĉuloj.

(daŭrigota)

La Aŭtunaj Muŝoj (parto 7)

LA AŬTUNAJ MUŜOJ (1931)

(daŭrigata)

Dum kelka tempo li deliris tiel, kaj subite li eligis ian plendan krion, vokis: "Aleksandro Kiriloviĉ, kial vi forlasis nin, barin?"

Fluo de vomaĵo, nigra sango kaj alkoholo eliris el liaj lipoj; li agoniis ĝis la mateno kaj mortis.

Tatjana Ivanovna ligis per feraj ĉenoj la pordojn de la salono kaj eliris sur la terason tra la pli eta kaŝita enirejo de la galerio. La statuoj estis ankoraŭ entenitaj en kestoj el tabuloj. Ili estis enfermitaj en Septembro 1916 kaj forgesitaj tie.

Ŝi rigardis la domon. La delikata flava ŝtonkoloro jam nigriĝis pro la neĝfandiĝo; sub la folioj de akanto la stuko skvamiĝis kaj montris blanketajn makulojn, kvazaŭ kuglospurojn. La vitroj de l' oranĝerio estis rompitaĵoj de la vento.

Se Nikolao Aleksandroviĉ vidus tion...

Ŝi faris kelkajn paŝojn en la aleo kaj subite haltis, levante la manojn al sia koro. Antaŭ ŝi staris homa silueto...

Dum momento ŝi rigardis sen rekoni tiun palan lacegan vizaĝon sub la militista kaskedo...

"Ĉu estas vi? ... Ĉu vi, Juroĉka?"

"Nu, jes", li respondis per stranga voĉo hezita kaj

Romano de Irène Némirovsky

malvarma. "Ĉu vi bonvolas kaŝi min ĉi-nokte?"

"Estu trankvila", ŝi diris kiel antaŭe.

Ili eniris en la domon, en la senhoman kuirejon.

Ŝi eklumigis kandelon, kiu prilumigis la vizaĝon de Jurij.

"Ho; Sinjoro! Kiel vi ŝanĝiĝis!... Ĉu vi estas malsana?..."

"Mi havis tifon" li diris per malrapida raŭka voĉo, "kaj malsaniĝis kiel hundo tre proksime de ĉi tie, en Temnaja... Sed tion mi timis sciigi al vi. Mi estas sub minaco de aresto kaj mortopuninda." li findiris kun la sama unutona kaj malvarma voĉo.

"Mi dezirus trinki..."

Ŝi metis akvon antaŭ lin kaj surgenuiĝis por malligi la malpurajn ĉifonojn, kiuj volvis liajn nudajn piedojn.

"Mi longe iradis" li diris.


Ŝi levis la kapon kaj demandis:

"Kial vi venis? Ĉi tie la kamparanoj estas malsaĝaj..."


"Ha! Ĉie estas same! Kiam mi eliris el la malliberejo, la gepatroj jam foriris al Odeso... Kien mi iru?... La homoj iras kaj reiras, iuj norden, aliaj suden..."

(daŭrigota)

tradukis MIKELO (Michel Deryger), el Francio



Ŝercoj



- S-ro kuracisto, mi parolas kun mi mem.
- Ne zorgu, multaj homoj tiel parolas al si mem.
- Sed s-ro kuracisto, mi jam enuis paroli kun tiu stultulo!

* * *

- Mi aŭdis ke vi edziĝis.
- Jes.
- Gratulojn! Ĉu vi estas feliĉa?
- Mia edzino diras: jes...

* * *

Du amikoj.

- Ĉu vi edziĝas kun via koramikino?
- Ne, ŝi diris ke mi estas malriĉulo.
- Sed vi havas riĉan onklon, kial vi ne diris tion al ŝi?
- Ha! mi diris tion, kaj nun ŝi estas mia onklino...



Krucvortenigmo

-- el Semajno de Enigmoj



Silaba Krucvortenigmo

Skribu silabon en ĉiu kvadrato. Jen estas listo de bezonaj silaboj: **A, AL, BA, BRAL, ĈO, ĈO, DO, DO, DRA, ĜI, ĜI, HI, ĴO, KO, LA, LO, MI, PA, RA, RI, RO, ŜI, TA, TI, TOJ, ZO.**

HORIZONTALAJ DIFINOJ (→) 1. Kolbaso kiu devenas el la Iberia duoninsulo; 3. Iĝi hidrato; 6. La ___ de Da Vinci (Dan Brown); 7. Konvekŝaĵo en objekto; 8. Bandaĉo, hordo; 9. Granda en vertikala; 10. Alpa montara sistemo kies plej alta punkto estas la Marmolada; 11. Aro da ŝipoj, konvojo.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓) 1. Dolĉa manĝaĵo farita el kakao; 2. ___ matene, ploro vespere; 3. Japana ujo, ordinare ceramika; 4. Ŝoso de pli maljuna planto; 5. Dependanta teritorio de Britio en Suda Eŭropo; 7. La havonto de ĝirita papero aŭ sumo (pluralo); 8. Havi koran aŭ seksan inklinon al iu; 9. Rilata al alpoj.

1	2			3	4		5
6			7				
		8				9	
10					11		

22 > de la ambicioj de juneco, kaj tiuj siavice - de la ambicioj de matura virino. Kaj samtempe ŝi ne estis infanca, naiva aŭ sensprita. Simple ekde infanaĝo ŝi alkutimiĝis ne nutri sin per ĥimeraj iluzioj, ne kombini fantaziajn planojn, ne aspiri al io tre forte. Nina scipovis esti simpla en ĉio. Ŝi estis simpla en rilatoj kun homoj, en rilatoj kun la vivo. Ŝi neniam postulis de ĝi ion pli grandan ol ĝi estis donanta al ŝi ĉimomente kaj samtempe volis, ke ankaŭ vivo rilatu al ŝi same.

Nina ne ŝatis elprovi sorton, ŝi ne ŝatis eĉ aŭskulti pri fremdaj elprovoj. Iufoje ŝi pensis, ke eble tiuj homoj estas mem kulpaj pri siaj problemoj, ĉar kiam vi petas vivon pri io pli granda, tiam ĝi povas postuli de vi la samon. Do la infanaĝo de Nina transfluis tiel glate, tiel nerimarkeble en la junecon, ke ŝi ŝajnis esti ĉiam

fraŭlino kaj neniam knabino. Kaj poste same alvenis matureco, kaj nun ŝi ŝajnis esti ĉiam virino kaj neniam fraŭlino. Kaj la samon ŝi atendis de maljuneco. Dirante pli ĝuste, Nina sciis, ke nenio ŝanĝiĝos, ŝi estos la sama, kaj ĉio ĉirkaŭe restos la sama, almenaŭ sur ŝia teritorio, en ŝia loĝejo. Nina scipovis ĝoji pri la hodiaŭa tago, ŝi ĝojis pri florantaj arboj, varmaj matenoj, kiujn ĉiam pli ofte anstataŭis la malvarmaj, bongustaj manĝaĵoj, bonaj filmoj, sed pleje Nina ĝojis pri la ĉeesto de Floro. Ŝi apenaŭ povis imagi la vivon sen ĝia lanuga varma korpeto sur ŝiaj brakoj. Kaj, kio estis plej grava - Nina mem sentis, kiel Floro bezonas ŝin, kiom grava ŝi estas por ĝi.

(daŭrigota)

Mallonga Historio de Filozofio (35)



Saluton,
En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun la jena filozofo.

Vasil Kadifeli

terapiisto por forigi la malordon kaŭzita de la lingvo. Li donis multajn ekzemplojn pri kiel oni devas sekvi logikon por forigi tiun malordon. Lingvo ne nur nomas objektojn.

Anoj de la sama familio havas komunajn aspektojn, sed ne ĉiuj havas la saman aspekton. Tamen ekzistas desegno de “superkovrantaj” similaĵoj. Li uzis tion kiel metaforo por ekspliki la manieron lingvo funkcias. Pensu pri “ludoj”. Estas diversaj ludoj kies komuna eco estas “ludo”. Kelkaj havas regulojn kelkaj estas senregulaj, aliaj havas venkantojn aliaj ne ktp. Ili estas tre diversaj krom, ke ili estas ludoj. Do, ludoj similas al familiaj trajtoj.

Laŭ Wittgenstein lingvo estas “serio de lingvo ludoj” kaj ni uzas ĝin por diversaj celoj. Filozofoj konfuziĝas ĉar ili pensas, ke lingvoj estas uzataj por nur unu aferon tamen ni uzas ilin por diversaj aferoj en diversaj manieroj. Kiel filozofo, tio, kion li volis fari estis montri la elirvojon al muŝo kaptiĝinta en botelo. Filozofoj similas al muŝoj en botelo daŭre frapiĝantaj sur la vitraj muroj de la botelo sen povi eskapi el ĝi. Filozofoj faras malĝustajn demandojn kaj ili enkondukiĝas malĝuste pro la lingvo.

Lingvo ne nur nomas la diversajn objektojn. Estas eraro pensi tielmaniere pri lingvoj. Lingvo ne estas nur unu ilo sed aro de diversaj iloj. Lingvo estas serio de agoj ligitaj al la praktika vivo de la parolanto. Kiam vi sentas doloron kaj priskribas ĝin vi uzas vortojn pri tiu via sensaĵo. Laŭ Wittgenstein vortoj ne povas esti nomoj esprimi vian sensaĵon. Vortoj estas komunaj. Kiel la vortoj “mi havas doloron” povas esprimi ĉiujn tiajn sensaĵojn? Nenies lingvo estas privata.


La ideoj de Wittgenstein estas iomete malfacilaj por kompreni.

(daŭrigota)

Ludwig Wittgenstein (1889–1951)

Sub la sorĉo de lingvo

Ludwig Wittgenstein estis tre eksterordinara filozofo. Ĉiuj pensis ke li estis genia homo. Li estis eta viro kaj instruisto. Dum li instruis, li iris tien kaj reen, faris demandojn al siaj studentoj, kaj li kelkfoje enprofundiĝis en pensojn kaj silentis por iom da tempo.



Neniu kuraĝis halti lian paroladon. Li neniam prepariĝis antaŭ la instruado, li dum antaŭ la publiko kaaj studentoj pensis pri kion diri kaj instruis laŭe. Li malkuraĝigis la legadon de filozofiaj tekstoj. Se oni prenis tiujn tekstojn serioze, oni devus forĵeti ilin sed pensi nur pri la enigmoj la tekstoj starigis.

Lia unua libro *Tractatus Logico-Philosophicus* (1922) estis en la formo de numerigitaj mallongaj tekstoj, ŝajne en formo de poezia libro. Ĝia ĉefa temo estis ke respondoj al demandoj kiel religio kaj moralo superas nian forton de kompreno. Se ni ne povas diri ion kompreneblan pri tiaj demandoj tiam ni devas silenti.

La temo de liaj postaj libroj estis “la sorĉo de lingvo”. Laŭ Wittgenstein lingvo miskonduktas la filozofojn kaj trenas ilin en ĥaoso. Ili kaptiĝas en la sorĉo de la lingvo. Oni devas transpreni la rolon de

Memnon *

poemo de Marjorie Boulton

Statuo, ŝtono en dezerto,
Sur brila sablo, brulsoifa,
Mi staras morta, sensignifa;
Ĉe la piedoj nur lacerto

Estas kunulo kaj konsolo.
En spaco sen videbla verdo
Mi staras, monument' de perdo
Granita, trista en izolo,

Sen homa koro aŭ kapablo,
Kaj ŝtoniĝinta per doloro!
Mi staras sub kruela gloro
De brula suno sur la sablo.

Sed, ŝtono kiu vundojn sentas,
Per mia propra sango ruĝa,
En sabloŝtorm' turmenta, muĝa,
Mi staras blinda. Mi silentas.

Sed kiam ŝtormas ventaj vipoj
Tra tiu korpo sen espero
Dum sunleviĝo aŭ vespero
Mi kantas tra la ŝtonaj lipoj.

Ne mi, ne mi, sed senkompata
Kaj stranga vento lipojn movas,
La akra vento kiu blovas'
El lando nigra, nekonata



* *Memnon*: Etiopia batalanto mortigita de Akilo dum la milito de Trojo, kiel repago por la mortigo de Antiloko.

Ĉi tiu estas fabelo de ĵemajtaj fabeloj tradukita el litova lingvo al Esperanto per samideano Antanas VAITKEVIČIUS, emerita instruisto de angla lingvo. Li loĝas en Alsédžiai, distrikto de Plungė. Li esperantistiĝis preskaŭ antaŭ 50 jaroj dum studado en Vilniusa universitato (1966-1971). Li verkis versojn en Esperanto, partoprenadis konkursojn "Muzo". Ĝuu la tradukaĵon.

sendis **Povilas Jegorovas**
el *Litovio*

-- oOo --

La kruela sinjoro tre molestadis siajn servutulojn. Kiam ili prilaboradis siajn parceletojn, la sinjoro senprokraste aperadis, la tutan parcelon forprenadis kaj ordonadis al ili iri al la arbaro elradikigi arbostumpojn, prilabori la agron kaj semi la grenon. Tiamaniere li ĝismorte turmentadis siajn servutulojn, malebligante ilin dece vivi.

Foje li pelis iun homon for de lia parceleto kaj ĉion forpreninte, montris al li arbaran ghakterenon dirante:

- Elradikigu la arbostumpojn, prilaboru la agron, vi reprosperiĝos kaj eĉ dankos min por tio.

Nenio farena estas por la homo. Li prenis hakilon, metis peceton da pano en korbeton kaj iris por labori. Li metis saketon sur la stumpon kaj ekeligadis la stumpojn tiel energie, ke la tuta ĉirkaŭaĵo pleniĝis per polvo. Dume iris preter li diablo. Li ekvidis la saketon kun pano kaj kaptinte ĝin brukuregis al la infero. Kaŭriĝinte en la angulo li aŭskultas, kiel la servutulo ekblasfemos lin. Sed la servutulo, ekvidinte, ke iu ŝtelis lian panon, nur peze ekspiris kaj plulaboras. Surpriziĝis la diablo kaj diras al la Lucifero:

- Via moŝto, hodiaŭ mi ŝtelis panon de servutulo, dezirante por ke li malbenu kaj blasfemu. Sed li nenion diris, nur pliprofundiĝis en la laboron.

- Vi malbone faris, - ekkoleris Lucifero. - Vi ne povas homon molesti. Iru kaj laboru pro la ŝtelita pano.

Transformiĝis la diablo en homon kaj veninte al la servutulo diris:

- Hej, homĉjo! Vi tre malfacile laboras, eble vi volas dungi min?

- Kiel mi povas dungi vin, ke mi nenion posedas. Eĉ hodiaŭ mi laboras malsata, ĉar iu ŝtelis mian panon, - respondis la homo.

- Ne gravas, - asertas la diablo. - Mi bezonas nenian pagon. Mi konsentas ekzisti laŭ via vivmaniero. Nur dungi min. Vi ne bedaŭros.

La homo konsentis kaj la diablo ekdungigis.

Atentiginte la diablon pri la farotaj laboroj, la servutulo iris hejmen por manĝi kaj poste liveri la matenmanĝon al la nova dungitulo. Kiam la diablo ekestis sola, li elradikigis ĉiujn arbostumpojn el la tuta haktereno, per siaj kornoj plugis la agron kaj per la ungegoj erpis ĝin. Reveninte la homo ekvidis, ke la agro estis tiel prilaborita, ke estis agrable spekti ĝin kaj ĉiuj stumpoj kaj radikoj estis metitaj en amasojn.

La dungitulo diras al li:

- Rigardu! Mi jam prilaboris la agron. Vi povas semi tritikojn kaj la rikolto estos bonega.

La homo spektis la novan agron kaj ĝuegis la novan laboriston.

Tuj tritikoj estis semitaj kaj la rikolto estis tiel bona, ke ili eĉ el la agro verŝiĝis.

Kaj la sinjoro ekvidinte bonan rikolton, eksentis envion en sia koro kaj diris al la servutulo:

- Kunveturigu ĉiujn tritikojn en mian garbejon kaj vi povos preni el ĝi tiom da greno, kiom vi povas levi.

Li konis, ke unu homo ne sukcesos multe da greno levi: eble nur kvin aŭ dek garbojn, sed ne plu.

Nenio estas farena por la servutulo - ne estas ebla parole venki la sinjoron. Kune kun la dungitulo ili veturigis la tritikojn en la sinjoran garbejon.

- Nun vi povas porti, kiom vi povas levi, - diras la sinjoro. - Vi vidas, kia bona mi estas. Mi nenion molestas.

- Estos pli taŭge, se mia dungitulo portos. Ja li estas pli juna kaj forta.

- Bone, - konsentas la sinjoro.

La dungitulo saltis en la garbejon kaj ektordis ŝnuron el la grenplantoj. Li uzis duonon de la grenplantoj kaj la ŝnuro ekiĝis longa kaj dika. Tiam li ĉirkaŭligis la tutan garbejon kaj surŝultriĝinte ĝin, ekiris al la korto de la servutulo. Ŝajnis, ke grandega monto memstare rampas tra la kampo.

- Ho, ankoraŭ restas iom da loko sub la ŝnuro! - ekkriis la dungitulo, prenis la sinjoron je lia kolumo kaj enŝovis lin en la grenamasegon. Ĝis kiam li portis la grenon al la celo, la sinjoro estis sufokiĝinta.

Alportinte la grenon, la dungitulo klakis per siaj polmoj kaj ĉiuj tritikoj draŝiĝis. Ekiĝis tia granda amaso da greno, ke eĉ la sinjoro ne havis tiom post la aŭtuna draŝado.

- Nun mi estas rekompenciinta por la pano, kiun mi ŝtelis de vi, - diris la dungitulo kaj ekiris laŭ sia vojo. Kaj la servutulo vendis la tritikojn, profitis ege da ormoneroj, la tutan jaron ĉiutage manĝis blankan panon kaj ne ĉesis laŭdi sian dungitulon.

Grilo kaj Alifor

Grilo senespere fermis la pordon malantaŭ si. Formiko senkompate rifuzis lin.

Blovis malvarma vento, flavaj folioj flugadis en la aero. Ĉi matene prujno kovris la tegmenton de lia nehejtata kabaneto. Li frostis. Kaj nun li devos iri hejmen en la malvarman dometon. En la kamparo baldaŭ li trovos nenion por manĝi, kaj mortos. Se li vendus la violonon?... Sed kiu aĉetus ĝin? Kiu sciis kanti per ĝi, kiu volus ellerni violonludon? Tiu kiu havas monon por aĉeti violonon, malestimas la arton. Kiel Formiko. Ja la arto estas senutila. Serioza formiko laboras por amasigi pli kaj pli da havaĵo. Kiam li pruntepetis, Formiko primokis lin.

Malgaje Grilo paŝadisis al sia malvarma kabaneto. Vesperiĝis.

Subite li ekaŭdis mallaŭtan voĉon el korto. Kaŝita malantaŭ barilo, alia formiko alparolis lin. Tiu formiko, Alifor, estis frato de Formiko, sed malpli riĉa. Sed la fumtubo de lia domo eligis fumnubetojn al la griza ĉielo, kaj li invitis Grilon endomen. "Venu, eniru rapide!" - li diris, "ne vidu vin mia frato!" li diris. Kaj la malgaja Grilo ekiris kun Alifor en lian domon. Ene estis varme, kaj la edzino de Alifor regaligis Grilon per bongusta vespermanĝo. Poste Alifor verŝis al li vinon, kaj diris. "Mi ŝatas vian violonludon. Dum la somero mi aŭdis ĝin, kaj mia koro pleniĝis per ĝojo. Mi laboradis, kaj ŝajnis, ke la laboro fariĝas pli facila. Eĉ labori estas pli gaje, kiam sonas via muziko."

"Ĉu vi aŭskultis min kaj ŝatas mian kantadon?" -

verkis kaj sendis Lenke Szász, el Rumanio

gajiĝis Grilo. "Mi nur ludadis por elverŝi mian koron, miajn ĝojojn kaj malĝojojn. Sed la popolo laboranta ridis kaj insultis min pro nenifarado." - diris Grilo mire.

"Jes, mi ŝatas vian kantadon, kaj ankaŭ mia edzino. Venu al ni dum la mornaj vintraj tagoj, kaj kantu al ni" - diris Alifor amike, kaj aldonis: "Sed prefere vi venu kaŝe, ke mia frato ne vidu vin. Li diras, ke mi amikiĝu nur kun riĉaj, influhavaj formikoj, kiuj povas apogi min, helpi mian pliriĉiĝon."

"Vere, mi estas malriĉa, mi havas nenion krom la violono. Neniam mi revadis pri riĉeco. - konfesis Grilo honteme - Sed via frato pravas. Nun mi mortos pro la frosto kaj malsato. Se mi ne perlaboris provizojn dum la somero"... - aldonis li mallaŭte.

"Sed vi helpis min, kaj ankaŭ tiujn riĉajn avarulojn! - objetis Alifor. - Via muziko gajigis nin, nia penado fariĝis malpli peza. Vi beligis niajn vivojn, eĉ se oni ne volas rekoni. Venu al ni, venu ĉiutage! Ankaŭ mia edzino ŝatas vian muzikon, kantu al ni! Kantu pri la printempo, kaj la vintro pasos pli rapide." - diris Alifor kun varma amikeco. Kaj tiel okazis.


Sed oni neniam eksciis, ke Grilo ne mortis. Li ĝisvivis la vintron dank' al sia arto, dank' al la sentema frato de la avara Formiko.

verkis kaj sendis **Lenke Szász**, el Rumanio



Pri Transnormalaj Fenomenoj

Unu el la plej bonaj argumentoj favore la objektecon de la "transnormalaj fenomenoj" estas, ke oni konstatas, ke plejparte ili tute ne aperis nur en nia tempo, sed ĉiam, simple ĉiuepoke viditaj per la okuloj de l'epoko. Ekzemple jen (mi provis konservi la stilon de la epoka teksto!) en libro de Noël Taillepie (elp. Noel' Tajpje) eldonita en 1588 kaj titolita "Psikologio, t. e. traktato pri aperoj de l'spiritoj, nome la disigitaj animoj, fantomoj, mirindaĵoj, mirigaj okazintaĵoj":



sendis Roland Platteau el Francio

« Ofte okazemas, ke kiam iu el niaj parencoj loĝantaj en fora lando pereige malsanas, ni aŭdemas fali en la domo aĵojn, kiuj ŝajne pezas kaj faremos mirigan bruon; kaj poste ni ektrovos tion okazinta en la horo mem kiam ĉituj parencoj forpasintos. Estas afero kia ordinara je kelkiuj, ke kiam persono estas mortonta, ili aŭdemas fermiĝi aŭ malfermiĝi la fenestrojn kaj pordojn, surŝtuparajn suprenpaŝojn, kaj aliajn similajn okazaĵojn.

...
lajfojn iu spirito montriĝos en la domo, kion ekvidantaj la hundoj sin ĵetemos inter la kruoj de sia mastro, kaj ne konsentos disdeiri, ĉar ili tre forte timas spiritojn. »

(Noël Taillepie)

sendis **Roland Platteau** el Francio




Printempo jam delonge memorigis pri si, sed ne per verdaj folioj ekster la fenestro, ne perodoro de floroj, ne per kantado de birdoj. Ne, en ŝia urbo kiel la unuaj pri la printempo komencis paroli la muroj. Post kelkaj pluvegoj la printempo ŝtelpenetris la vestoriparejon per grizaj malpuraj ŝimomakuloj, kaj tiu printempo odoris tute ne romantike kaj ne favoris al disvastigo de fluidoj sur reprezentantojn de la malsama sekso. Do Nina plu sidis ĉe la fenestro sole, plene profundiginte en sian laboron. Se antaŭe iu el viroj havis okazon viziti por nelonge la atelieron, ili turnis sian atenton al Nina ne pli ol al neluksa meblaro. Malnova seĝo, sur kiu ili kutime sidiĝis, vekis ĉe ili pli da intereso. Sed tio tute ne koncernis Nina-n, kaj ĝenerale malmulto koncernis ŝin en tiu ĉambro. Ŝiaj oreloj foje kaptis iajn strangajn aŭ laŭtajn sonojn venantajn de la strato tra la putraj fenestroj, sed mense ŝi delonge estis hejme. Nina pense revenis hejmen tuj, kiam ŝi venis al ŝia laborloko. Nun ŝia hejmo estis ja ne nur malgranda unuĉambra loĝejo, nun vivis en ĉi loĝejo iu, kiu atendis ŝin. Kaj tiu estis Floro.

La virino ne rimarkis, kiel ĉio okazis. Kiel okazis, ke tiu estaĵo eksignifis por ŝi pli ol ĝi devus. Nina rimarkis, ke ŝi ĝojas pri ĝia ĉeesto pli ol pri la ĉeesto de ajna persono en sia vivo. Kaj tio tute ne timigis la virinon. Male, nun malmulto ŝin timigis. Ŝi sentis trankvilon ĉiumatene, kiam ŝi vekiĝis kaj vidis apud si Floron. Kaj ankoraŭ ŝi sentis trankvilon, kiam ŝi nokte ekdormis kaj aŭdis, kiel sur ŝian rufan hararon, disĵetitan surkusene, kuŝiĝis same rufa Floro kaj verŝajne kunfandiĝis kun ĝi. Nina eĉ provis imagi, kiel amuze tio povus aspekti. Kaj ankoraŭ Nina sciis, ke apenaŭ ŝi venas de la strato en la porĉon, Floro saltas de la sofo aŭ seĝo, kuras al la enirpordo de ilia loĝejo en la kvina etaĝo kaj jam nenien de ĝi deiras, ĝis ĝi finfine renkontos ŝin, Nina.

Kaj Nina vere vidis la katinon ĉiufoje, kiam ŝi malfermis la pordon. Ŝi ĵetis siajn sakojn kaj antaŭ ĉio prenis Floron en siajn brakojn. Kaj tiel estis ĉiutage, dum multaj tagoj, multaj monatoj. Nina ne maltrankviliĝis, ke jam tiel longe ŝi estas infane alligita al la besto, ke ŝi en sia vivo nenion plu serĉas, nek bezonas. Ŝi simple neunufoje pensis, ke homoj ne povas esti tiaj kiel bestoj - simple ami, sendepende de io.

Nun printempe la malsana genuo ĉiam pli tedis Nina-n, ĝi doloris tordate tiel kvazaŭ post lavado oni tordelpremas malsekajn vestaĵojn. Foje tiu teda doloro forprenis ĉiujn fortojn. Ŝi povis fari nenion, nur sidis kaj frotis sian genuon per diversaj unĝentoj, kiuj helpis,

sed ne por longe. La tutan tempon Nina pacience atendis, ke Floro iam aliros kaj tamen kuŝiĝos sur la malsanan lokon kaj tiam ŝi ne plu devos fari tiujn sensencajn aplikojn de la medikamentoj. Sed Floro, kio estis sufiĉe strange, neniam faris tion. Iam (Nina jam ne memoris kiam kaj kie) ŝi aŭdis, ke katoj sentas, kiam al homo estas vere malbone, kaj nur tiam helpas. Nina pensis, ke jen nun estas tiu momento, ĝuste nun al ŝi estas tre dolore kaj ĝuste nun ŝi kiel neniam bezonas helpon. Sed helpo venis de nenie, do al Nina nenio plu restis ol simple plu atendi. Kaj ŝi atendis.



Akvarelo de Natalia Pendjur

- Nina, vi ja estas strangulino - diris Maria, koleginino de Nina, kiun ial incitis tia, laŭ ŝia opinio, malsaneca alligiteco al la besto. - Vi devas krei familion, ekhavi infanojn. Finfine, vi bezonas homon, sed ne katinon.

- Sed mi ofte ne komprenas homojn - naive respondis Nina. - Sed katinoj... ili estas multe pli simplaj, ili...

- Sed vi estas ja homo, Nina, vi estas virino, kaj por virino estas eĉ pli grave, nekredinde grave ne esti sola. Ĉar esti sola dum maljuneco estas neelteneble, kaj maljuneco ne estas tiel malproksima.

- Sed mi ja ne estas sola, Maria, kaj maljuneco, mi opinias, ne estas tiel timinda.

Maria ne sciis, kion ŝi povas respondi al Nina pri ŝiaj lastaj vortoj, do lasinte ŝin agi laŭ sia bontrovo, ŝi reekokupis sin pri sia laboro.

Kaj Nina vere ne tre timis maljunecan, kaj eble tute ne timis. Ja kial homoj timas maljunecan? Antaŭ ĉio ili timas ŝanĝojn. Ili timas, ke post ĝia alveno io ŝanĝiĝos definitive. Sed la vivo de Nina estis ĉiam egalritma kaj monotona, ĝi fluadis per homogena maso tra ŝia viva, tute rekta vojo (ne kurba, kiel estas kutime dirate en paroladoj dum studfinaj festoj), kolorigante ĉion ĉiam neŭtralkolore. Ŝiaj infanaĝaj ambicioj ne tro diferencis

Komplika poemo

Mi ja amas vin, sed la popolo ankoraŭ ne pretas je tio
La nukleaj provoj, la Kioto-kontrakto, la tutmonda
varmiĝo, ktp...

Eble vi estas tre juna, eble mia animo jam mortis
Iomete de Nietzsche iomete de Kafka, eble vi
konfuziĝis

Oni malbonigis Parlament-cigaredojn, ĉu restis
branĉo por sinteniĝi?

Estis saĝa prostituisto, kiun mi konis el noktoklubo!

Ŝi diris, ke legi libraĉojn similas al vivi malbone...

Mi legis bonajn librojn sed ili ne kontribuis eĉ al
fekaĵo...

Mi fakte amas vin, sed mi timas, ke tio malhelpos
mian viv-aranĝon

Povas ke nin trafos amafero senintence

Kaj ni komencos iri al kinejo manenmane

Mi malvole aĉetos florojn, kombos la hararon, uzos
parfumon.

Ofendiĝoj, repaciĝoj, svenadoj, reakirado de sensoj
Kaj fakte en la fino la neevitebla disiĝo.

Estis stulta filozofo, kiun mi konis el taverno!

Li estis diranta, ke belaj virinoj plilongigas la vivon

Multaj belaj virinoj eniris en mian vivon

Ĉiuj fekis je mia buŝo...

Mi ja amas vin, sed mia Dio ne pretas je tio.

Li amas la plej belan en ĉio, Li volas idealajn kuniĝojn

En la sofo sur kiu ni sidiĝos unu apud la alia

Nek dia justeco, nek dialektiko povas enpremiĝi.

En mia profundeco kaŭriĝas malprofunda bubalo.

Mi ja amas vin sed

Ne komencu tiajn aferojn nun, pro kio la bezono mia
belulino.

Mi neniam entrajniĝis kun vi

Mi neniam piediris kun vi sub pluvo
Kia aspektas via lanugo malsekiĝante
Mi neniam vidis

Mi neniam trinkis rakion kun vi

Oni diras ke vi ebrie parolas sakraĵojn

Mi neniam aŭdis.

Mi neniam entrajniĝis kun vi

Ĉu vi ŝatas apudfenestran seĝon aŭ koridoran

Mi neniam sciis.

Mi neniam tenis viajn manojn

Mi nur imagis ĉu ili estas varmaj ĉu malvarmaj

Mi neniam tuŝis

Mi neniam rigardis viajn okulojn

Sed ili estis tiel nebulaj en miaj sonĝoj, ke

Mi neniam forgesis

** Ali Lidar estas filozofia insruisto,*

verkisto kaj poeto. Li komencis

sian verkistan karieron pere de

reta blogo, kie li verkis de tempo

al tempo por forigi sian

korpremitecon. Li diras, ke li tute

ne zorgas ĉu iu legas aŭ ne siajn

verkaĵojn. Li nur volas elverŝi

sian internon kaj tiel malstreciĝi. Ĉar li verkas

senzorge, homoj ŝatas liajn verkaĵojn pro la intimeco

kaj natureco ili portas. Ĝis nun li aperigis ses librojn,

sed li estas verkisto, kiun homoj ĉefe

sekvas surrete. Li nun havas milojn

da legantoj.

Tradukis **Fatma Eroĝlan**, el Turkujo



La vojeto

verkis Elena Popova, el Bulgario

La vojeto estas paŝosignoj de multaj homoj, kiuj pasis antaŭ vi. Ili estas rektaj aŭ kurbaj, mallongaj aŭ longaj, puraj aŭ surkreskitaj per herbo, kiel la vivo de la homoj. Luj homoj ne pensas pri tiuj, kiuj paŝis antaŭ ili, ne pensas eĉ pri siaj paŝoj, kiujn ili postlasas. Sed unu kurba paŝo estas ankaŭ kurba penso, unu stampo sur iu loko – sendecidemo, unu mispaŝo en la



koto – ho, vi ne permesu tion!

Se vi decidus fari vian vojeton, antaŭe pripensu kien kaj kial vi ekiros, ĉu por bono aŭ pri malbono. Vi petu helpon, por ke estu rekta via vojeto, ke sur ĝi iru ankaŭ viaj infanoj.

Terparteto, piedpremita, sed skizita de la penso kaj animo homa, ĉu ni memoros vin? Kaj se jes, kiel?



Kiam, en oktobro 2012, mi decidis kuri la Berlinan Maratonon 2013, mi tuj intencis plibonigi mian konon pri la Angla lingvo por interkompreno kaj konversacio.

Mi elŝutis "mp3-ajn" malmultekostajn kursetojn, sed eĉ aŭdante ĉiutage dum la vojo al laboro mi ne bone progresis. Do mi faris buĝetojn pri kursoj en 2 anglaj lernejoj sed mi trovis ilin tre multekostaj. Mi decidis: "Mi solvos la problemon je mia baza kono pri la Angla mem".

En Februaro 2013, mi ekmemoris pri Esperanto, ke mi jam konis antaŭ 20 jaroj, sed neniam praktikis, kaj tuj intencis provi ĉu ĝi funkcias.

Mi trovis en interreto diversajn paĝojn pri Esperanto kun senpagaj kursoj kaj videoj. Mi elŝutis kaj eklernis la "Kurso.exe". Samtempe mi eklernis per interreto alian kurson ĉe "http://pt.lernu.net/", kaj ankaŭ spektis la filmeton "Pasporto al la tuta mondo" ĉe Youtube.

Dum mia lernado mi trovis la "SEM - Societo Esperantista de Minaso" kie mi ĉeestis neformalajn klasojn. Per SEM mi konis esperantistojn kun kiuj mi renkontiĝis por babili dum unu horo semajne.

Post 4 monatoj mi konsideris Esperanton mia dua lingvo ĉar mi jam komprenis tekstojn kaj, ĉefe, aŭdiojn, pli facile ol la Angla. Mi enskribiĝis ĉe la programo "Mia Amiko" (<http://esperanto.brazilo.org>) kaj ekricevis helpon de esperantistino kiu korektis miajn ekzercojn de "Kurso.exe" per la reto.

Post 6 monatoj, mi jam finis miajn memlernajn kursojn, telefonis al germana esperantisto kaj interparolis unua foje pere de Esperanto kun eksterlandano. Tio ŝajnis magio.

Mi diris al li pri Berlina Maratono kaj, per li, mi ricevis inviton de franca esperantisto por renkontiĝo kiu li organizas ĉiumonate en Berlino.

En Berlino, la 27an de septembro, ni renkontiĝis en restoracio - kie ĉeestis dek du esperantistoj - kaj babilis per la sola lingvo, ebla al mi en tiu momento: la Esperanto. En la 29-a, mi partoprenis filmante la maratonon kaj, entuziasme, mi registris momentojn en Esperanta lingvo (<http://youtu.be/rXpJ82Xvvvk>) krom la Portugala.

En la sekva semajno mi partoprenis en Barcelono alian renkontiĝon kun ok katalunaj esperantistoj. Tie ni babilis libere kaj nature, gustumante tre bongustan bieron laŭ la stilo "Drinku kaj Lernu".

Dum mia lernado, mi rimarkis ke multaj Esperantistoj konsideras Esperanton perfekta lingvo kaj ke ĝi ne bezonas ŝanĝojn. Mi ne konsentas, sed en tiu sperto mi konstatis ke la lingvo perfekte funkcias.

Kompreneble ke, kun tiom malmulte da esperantistoj en la mondo, ĝenerale mi solvis miajn problemojn je la angla mem. Sed nun, mi povas diri ke, lerni Esperanton estas tiom facila kaj malmultekosta ke, se ĉiuj homoj, kie ajn en la mondo, kiuj ne povas pagi fremdan lingvan kurson, lernus Esperanton, en tre malmulte da tempo Esperanto fariĝus la plej parolata lingvo por internacia komunikado.

Esperanto estus bonega rimedo, ekzemple, por landoj kiuj apartenas al ekonomia bloko kiel en BRICS (Brazilo, Rusio, Hindio, Ĉinio kaj Sudafriko), kiuj havas 5 tute malsamajn lingvojn, faciligi la scian interŝanĝon inter ĝiaj civitanoj, dum malmulte da tempo kaj kun malalta kosto por ĉiuj.

Pli pri Esperanto: <http://www.esperanto.net>
Brakumon,

verkis **Vicente Sales**, el Brazilo



La virineto de maro (eltiraĵo)

-- de Andersen "Malproksime en la maro . . ."

Malproksime en la maro la akvo estas tiel blua, kiel la folioj de la plej bela cejano, kaj klara, kiel la plej pura vitro, sed ĝi estas tre profunda, pli profunda, ol povas atingi ia ankro; multaj turoj devus esti starigitaj unu sur la alia, por atingi de la fundo ĝis super la akvo.

Tie loĝas la popolo de maro.

Sed ne pensu, ke tie estas nuda, blanka, sablafundo; ne, tie kreskas la plej mirindaj arboj kaj kreskaĵoj, de kiuj la trunketo kaj folioj estas tiel flekseblaj kaj elastaj, ke ili ĉe la plej malgranda fluo de la akvo sin movas, kiel vivaj estaĵoj

Ĉiuj fiŝoj, malgrandaj kaj grandaj, traglitas inter la

branĉoj, tute tiel, kiel tie ĉi supre la birdoj en la aero.

En la plej profunda loko staras la palaco de la reĝo de la maro.

La muroj estas el koraloj, kaj la altaj fenestroj el la plej travidebla sukceso; la tegmento estas farita elkonkoj, kiuj sin fermas kaj malfermas laŭ la fluo de la akvo.

Tio ĉi estas belega vido, ĉar en ĉiu konko kuŝas brilantaj perloj, el kiuj ĉiu sola jam estus efektiva beligaĵo en la krono de reĝino.

Fonto: <http://fischer-zim.ch/esperanto/tekstoj/andersen--marvirineto.htm>

EKRA 2018 - Unua premio pri hajko poezio

<p>VOJAĜE KUN I.K.AIVAZOVSKY (1817-1900) Rusio – Armenio</p> <p>Ŝipo en plago sub la okul' de ŝtormo. Senvoĉa luno. ***</p> <p>Batalo nokte – ĉielruĝo pro fajroj. Sango kaj fumo. ***</p> <p>Plenluno – sur la luna vojo logita velŝipo naĝas. ***</p>	<p>Fiŝkaptistoj dum laboro je la maro. Suno en nuboj. ***</p> <p>Velŝip' en batal' inter la malamikoj. Postmorta gloro. ***</p> <p>El Ararato – homoj al estonto kun kred'al Noao. ***</p> <p>Neĝa senhomej' - karavano ĉe puto. Akvo printempe. ***</p>	<p>Flirtataj veloj – parado de velŝipoj. Milita pretec'. ***</p> <p>Karavano kun hundoj inter lavangoj. Griza senfino. ***</p> <p>Di' sur la ondoj – timigitaj fiŝistoj. Malkredo kaj nun.</p> <p style="text-align: right;">Verkis Elena Popova el Dobriĉ, Bulgario <i>Unua premio pri hajko poezio en EKRA 2018 konkurso</i></p>
--	--	---

EKRA - 2018 en Razgrad, Bulgario por 29a fojo

La 01an – 03an de junio en Razgrad, Bulgario okazis por 29a fojo jam tradicia Esperantista Krea Renkontiĝo “Abritus”, organizita de la Esperantista Domo pri kulturo “D-ro Ivan Kirĉev”. En la programo de la festo estis prezentita plej nova libro de Ivaniĉka Maĝarova “Sortoj sur vojkruciĝo” kaj estis anoncitaj la rezultoj de la du konkursoj – la Internacia konkurso por originala esperanta poezio kaj humuro kun prezidanto de la ĵurio Venelin Mitev – elstara bulgara verkisto, tradukisto, ĵurnalisto, esperantisto kaj ĵurianoj: Josip Pleadin – elstara kroata verkisto, eldonisto, esperantisto kaj Ivaniĉka Maĝarova – longjara esperantistino kaj verkistino; La dua konkurso por traduko el bulgara okazas por 5a fojo. Ĝia ĵurio konsistas el: Marina Kumanova – prezidanto, denaska esperantistino kaj instruistino, D. Kateva – instruistino, filologo kaj M. Georgieva – multjara esperantistino, instruistino. Partoprenis 12 personoj el 6 landoj.

*sendis **Dimitrinka Kateva***

prezidanto de la Esperantista Domo pri kulturo en Razgrad, Bulgario

Martin – grava centro de la slovaka historio kaj kulturo

Martin (latine Sanctus Martinus, dum la periodo de Aŭstrio-Hungario hungare Turócszentmárton, germane Turz-Sankt Martin) estas belega kaj moderna distrikta urbo kun 60 000 loĝantoj, situanta en la nord-okcidenta Slovakio (ĉ. 230 km norde de la slovaka ĉefurbo Bratislavo).

La urbo spegulas ne nur la riĉan historion de la slovaka nacio, sed prezentas ankaŭ multfacetan eblon por feriado. La urbo estas ideala elirpunkto por ekkoni la belaĵojn de la Martin-regiono, nomata „Turiec-ĝardeneto” (pro la rivereto Turiec, kiu trafluas la distrikton Martin). Martin proponas por turistoj admirindan virgulin-naturon kun ebloj por somera kaj vintra turismo, biciklado kaj montarbiciklado, skiterenoj kun skiliftoj por skiistoj. Turistoj povas viziti diversajn muzeojn (tre konataj estas la muzeo de la slovaka

verkis kaj sendis Július Hauser, el Slovakio

vilaĝo kaj la muzeo de la eminenta slovaka pentristo Martin Benka) kaj aliajn interesajn vidindaĵojn en la urbo.

La unua skriba mencio pri Martin datumas de la jaro 1264. La urbonomo devenas de la nomo de la urba preĝejo. Martin fariĝis urbo en 1340. La husanoj bruligis ĝin en 1433, sed la urbo evoluis kaj en 1489 akiris ankaŭ rajtojn de kampurbo. En 1861 en Martin okazis granda kunveno de slovakoj, en kiu oni postulis aŭtonomion de la slovaka nacio. En tiu periodo la urbo transformiĝis en gravan centron de slovaka kulturo, politiko, scienco kaj arto.

En 1863 oni fondis en Martin la Slovakian Fondaĵon (slovake Matica slovenská) kiel simbolon de la slovaka nacia kultura konscio sub la hungara regado. La fonda statuto estis aprobata la 21an de



aŭgusto 1862 fare de la aŭstra-hungara imperiestro Francisko Jozefo. La unua prezidanto fariĝis la katolika episkopo Štefan Moyzes [ŝtefan mojzes]. En 1875 la hungara registaro fermis la fondaĵon kaj konfiskis ĝian kapitalon. Post la ekesto de Ĉeĥoslovakio ĝi estis refondita en 1919. Al la Slovaka Fondaĵo apartenas hodiaŭ interalie ankaŭ la Patrolanda Muzeo, Slovaka Literatura Instituto, Slovaka Historia Instituto, Nacia Instituto de la slovaka Lingvo kaj Literaturo ktp.



La unua mondmilito (1914-18) radikale ŝanĝis la politikan pejzaĝon en Eŭropo. Ĉeĥoj kaj slovakoj sentis kaj esperis, ke ili povos fondi propran nacian ŝtaton. La 30an de oktobro 1918 estis subskribita en la urbo Martin historie tre grava deklaro (slovake Martinská deklarácia), per kiu la slovakoj postulis aŭtonomion en la nova ŝtato. Sed jam du tagoj antaŭe, la 28an de oktobro 1918, ankaŭ la Ĉeĥa Nacia Komitato en Prago donis sian aprobon al la fondo de ĉeĥo-slovaka ŝtato. Finfine, post la disfalo de Aŭstrio-Hungario Slovakio fariĝis parto de la nova ŝtato Ĉeĥoslovakio (kun Bohemio, Moravio, Ĉeĥa Silezio kaj Subkarpatio). Post cent jaroj, en 2018, okazas pluraj gravaj rondaj datrevenoj ligataj al la 100-jara historio de la komuna iama Ĉeĥoslovaka Respubliko, do, ne estas mirinde, ke partoprenis la centenarion en Martin ankaŭ la prezidantoj de la Slovakio kaj Ĉeĥio, ambaŭ ĉefministroj kaj aliaj altaj reprezentantoj de ambaŭ respublikoj.

La nuntempa blazono de la urbo Martin prezentas orharan kavaliron (Sankta Marteno), sidantan sur arĝenta ĉevalo kontraŭ blua fono. Per la maldekstra mano li levas ruĝan mantelon, en la dekstra mano tenas glavon. Antaŭ lia ĉevalo genuas almozulo. Laŭ legendo Martin estis romia soldato ĉirkaŭ la jaro 338 en la franca urbo Amiens. Lun vintran tagon ĉe la urbopordego de Amiens li renkontis almozulon, kiu apenaŭ estis vestita kaj tre frostis. Martin – per sia glavo – dividis sian mantelon en du duonojn kaj donis unu el ili al la almozulo. Tiun agon prezentas la urba

blazono.

Tre fruktodona estas hodiaŭ ankaŭ la internacia kunlaboro de la urbo Martin kun la eŭropaj ĝemelurboj Jičín (Ĉeĥio), Karviná (Ĉeĥio), Gotha (Germanio), Hoogeveen (Nederlando), Kalisz (Pollando) kaj Bački Petrovac (Serbio).

Esperanto-agado

En Martin riĉan historion havas ankaŭ la Esperanto-movado. En 1907 ĉi tie estis eldonita la unua slovaka lernolibro de Esperanto por slovakoj, „Fundamento de Esperanto”. Post cent jaroj, en majo 2007 en Martin okazis kongreso de Slovaka Esperanta Federacio (SKEF).

En la nacia tombejo, kiun oni fondis fine de la 18a jarcento kiel urban tombejon kaj en 1967 proklamis kiel Nacian tombejon kaj nacian kulturmemorejon, estas entombigitaj ankaŭ konataj slovakaj esperantistoj, kiel la pentristo kaj grafikisto Martin Benka (kiu esperantistiĝis kiel 59-jaraĝa kaj kontribuis i.a. al la revuo Esperantisto Slovaka), la verkisto Július Barč-Ivan [barĉ-ivan], la muzikverkisto kaj granda propagandisto de Esperanto Ján Valaštan-Dolinský [valaŝtan-dolinski], la kuracisto kaj admiranto de internacia lingvo Esperanto Ľudovít Izák, la honora membro de UEA (Universala Esperanto Asocio) Eduard Vladimír Tvarožek [tvaroĵek], kiu aŭtoris lernolibrojn por slovakoj („Esperanto en 14 lecionoj”), verkis poezie, proze, didaktike kaj drame („Ni ludas teatraĵojn”, „Sola en sunsubiro”, „Skizo de la Esperanta literaturo”, kaj aliaj).

Bedaŭrinde en la urbo ne estas Esperanto-broŝuro. Sed la turisma oficejo disponigas fremdlingvajn broŝurojn. Vizitantoj povas trovi informojn ankaŭ per Interreto; pliaj informoj kaj detaloj troveblas ĉe www.martin.sk, www.skanzenmartin.sk ktp.

verkis kaj sendis **Julius Hauser**, el Slovakio



Post kiam mi ricevis la vizon al Danio la 5an de julio 2011, mia revo vojaĝi al Danio kaj kongresumi por la unua fojo en Eŭropo ne plu estis nur revo. Estis malfacile trovi bileton por proksima estonto kaj, kompreneble estis pli multe kosta ol kutima beletprezo. Estis tiom forta deziro kaŝita en mia koro ke mi povis fari ĉion por realigi mian revon.



Sep personoj—mi, Indu Thapaliya, Bharat Ghimire, Parasar Rijal, Navaraj Budha, Nabin Subedi kaj Alinka Pokhrel—ricevis vizon. Estas la plej granda teamo de nepalaj reprezentantoj al eŭropa UK. Estis kvazaŭ granda batalo—kontraŭ neakceptema politika ondo en Danio, kiun mi ne povus venki se la LKK en Kopenhago kaj aliaj afablaj samideanoj de Germanio ne helpis min. Fakte, tio estis venko de Esperanto kaj ni pruvis ke ni ne estas individuoj sed membro de “unu granda familio” kaj ni trovas nian parencon en preskaŭ ĉiuj anguloj de la mondo.

La 20an de julio, mi estis en la flughaveno de Baharaino kaj mi atingis al kopenhaga flughaveno la matenon de la 21a julio. Estis gloro, venko, sukceso kaj komenco de realiĝo de mia revo. Post unuhora atendo venis al la pordo Peter Wrane, por akcepti nin. Mi konatiĝis kun li dum lia partopreno en Internacia Himalaja Renkontiĝo. Li konsentis nin gastigi dum antaŭ kaj post-kongresaj tagoj en Danio.

Estis mia plezuro gastigi en lia kvieta, bela kaj pura domo en Lyngby. Ĉio estis malsama ol mia Katmando. La pura aero, larĝaj stratoj, malaltaj kaj belaj domoj kaj malmulte da aŭtoj sur la strato—ĉio ĉiam memorigis min ke mi vere estis en alia parto de la mondo.

Mi vizitis al ILEI konferenco kaj ĝoje renkontis multajn konatulojn. Ili gratulis min por mia sukcesa alveno en Danio. La 44a ILEI kongerenco okazis en la

Universitato de Kopenhago, respektive Departamento pri komunikiloj, kognado kaj komunikado de Fakultato de Humanistiko.



Kaj ankaŭ estis malfacila dormi kiam la ĉielo heliĝas je la 4a en mateno. Tio estas la problemo—tagoj estas tro longaj (de 4a matene ĝis 10a vespere). Okuloj ne volas dormi sed korpo postulas dorm-ripozon. La prelego de Katalin Kovats pri KER ekzamenoj kaj edukado.net estis alloga. Troviĝas tiom bonkvalita ekzameno por lennintoj, sed domaĝe, terure multe kostas.

La 22an de julio okazis la ILEI simpozio, dum kio prezentis geprofesoroj kaj aliaj lingvistikoj pri estonteco de Espeanto en nuntempa internacia vivo. Estis multaj tutilaj prelegoj de diversaj esperantistoj el diversaj landoj. Estis la lasta tago kaj okazis gaja adiaŭa vespero.

La 23an de julio ni promenis ĉirkaŭ la antikva kastelo de kaj ni poste veturis al la Bella Centre, kie okazos la Universala Kongreso. Mia koro batis rapide kiam mi vidis tiun magestan arĥitekturaĵon per miaj okuloj.

Mi ricevis ŝakon ktp de la akceptejo. Post longa serĉado troviĝis multaj konataj gesamideanoj. Tuj komencis babilado pri niaj vivoj ktp dum horoj—unu post la alia venis kaj neniam mi estis laca kiam mi vidis konatajn geamikojn, aŭ pli interese, kiam oni kaptis min. Mi estas iomete konata inter multaj geesperantistoj pro mia blogo. Mi sukcesis doni 20 ekzemplerojn de mia libro “Vojaĝo al Muktinath” al la libroservo de UEA. Mi esperas ke oni aĉetos la librojn.



Ĉio estis en ordo sed la manĝaĵoj kostas terue multe en tiu hotelo kaj malfacile troviĝas aliaj vendejo ĉirkaŭe. La varoj ne malmulte kosis eĉ en aliaj vendejoj, ĉikarŭ 15 oble pli multe ol en Nepalo! Vespere okazis Movada Forio—oni metis materialojn

de iliaj Esperanto-movadoj sur table kaj komunikis kun vizitantoj.

Matene de la 24a julio okazis la solena inaŭguro de la 96a UK. Elstaraj prelegoj Esperanto-politikistoj ne plaĉas al mi. Estas retorikaj, ritaj ludoj kaj do estas tedaj. Sed la esprimoj de Pravaldas plaĉis al mi.

Estis tempo por landaj reprezentantoj saluti. Estas eble plej amuzaj programeroj. Oni povis vidi buntecon de Esperanto—vestaĵoj, vizaĝoj, koloroj, kaj ankaŭ dialektoj de Esepranto, el divesaj landoj anakŭ estas interesaj. Ne estas malbone, sed multaj homoj uzis tiun tempon por bonvenigi kongresanojn al siaj landoj.

Post la inaŭguro estis amuza liberatempo. Ĉar mi estis en nepala nacia vestaĵo, oni volis fotiĝi kun mi. Mi staris kiel statuo kaj venis novaj vizaĝoj apud mi—mi estas fiera ke esperantistoj agnoskis mian naciecon. Estis mia plezuro, sed mi ne scias kiom inter ili memoros min kaj sendos tiujn fotojn al mi.

Mi ĉeestis en la kunsido de Indiĝenaj popoloj, al la juna kunsido, al kunsido pri Fejsbook kaj aliaj. En ĉiuj kunsidoj, mi donis mi vigle partoprenis kaj ankaŭ donis mian ideon.

Tuj venis tempo por surstrata farandolo por Esperanto. Ni kuniĝis ĉe la pordo kaj trajnveturis ĝis la urbocentro. Estis pluvanta kaj mi ne portis pluvjakon. Kontraŭ pluvo kaj vento, ni montris la forton de Esperanto al danaj preterpasantoj. De tie ni marŝis ĝis Tivoli, kie okazos la nacia vespero.

La nacia vesper interesa. Estis kantoj, danco-kantoj kaj dramo senvortoj. Poste venis gajaj popolkantistoj el Grenlando. Mi ne povis kompreni kial mi ne povis vidi danan etoson en tiuj prezentaĵoj. Kron tio el Grenlando, estis simple eŭropaj por mi.

Estis la tago de Kleriga Lundo la 25an de julio. Mi estis ĉe la fakkunsido de Esperanto kaj interreto kaj aŭskultis koncerton de Nataŝa kaj Ĵomart. Tre bedaŭrinde, mine povis esti ĉe al tio de ĵurnalisto (TEĴA). Je la 5a okazis tri egale intersaj programoj—concerto de Ĵomart kaj Nataŝa, landa agado, Oomoto kaj TEĴA. Kial UK estas tiom mallonga? Kial okazas same interesaj programoj samtempe? Kial programoj estas interesaj? Stultaj demandoj estis plena sur mia kapo.

Mi ekmalsaniĝis. Mia kapo forte doloras kaj estis eĉ malfacila stari sen apogo. Sed mi volis ĉion ĝui de la

kongreso. Eble tio okazis pro sanĝo de manĝaĵoj. Anstataŭ iri en la bankedo, mi sole promenadis ĉirkaŭe. Kiam mi revenis balo daŭris. Estis tro ĝentila, milda kaj iom enua, taŭga por maljunuloj, eble.

Mi ne saniĝis ankaŭ en 26a de julio. Muzikon de Slotronik estis stranga. Pli interese okazis ĉe la kunveno de kongresa temo “Dialogo kaj Internkompreno”.

Poste esstis ĉe la kunsido de Sub-komutato de Landa Agado: Mi ne reprezentas mian asocion sed, post kiam Corsetti demandis, mi diris ke UEA devas kontroli kiam landaj asocioj forlasas demokratiajn morojn.

Magraŭ invito al la akcepto de la urbestro, mi ne povis iri pro malsano. Sed partoprenantoj diris ke ne partoprenindis. Cetere oni kritikis ke la urbestrino salutis geesperantistoj en al angla lingvo.

La kongresejo estis fermita la 27an de julio ĉar ĉiuj ekskursis. Betty Chattarji pretis ĉiĉeroni al nia malgranda grupo. Ni veturis al Norreport kaj piediris laŭ la bazaraj stratoj ĝis laborista kvartalo aŭ latina kvartalo. Ni iris ankaŭ al la tombejo kie kuŝis memoron de dana esperantisto Marie Schroder, kiu multe laboris sed tre june forpasis. Poste ni iris al la botanika ĝardeno kaj muzeo.

Koncerto komenciĝis je la 7a vespere. Unuaj ne estis bonaj sed je la fino, Kimo donis energion kaj elektron al la dancantaj aŭdantoj. Ankaŭ mi multe dancis ĝis nokto.

De la unua programo de la 28a de julio, Osmo Buller, la ĝenerala direktoro de UEA, lerte respondis. Nature, kiam okazas granda evento, venas aplaŭdoj kaj plendoj.

Oni diris ke presado kaj afranko de revuo “Esperanto” multekostas. Mi diris oni almenaŭ unu foje en jaro devas kontroli ĉu ĉiuj legantoj vere legas aŭ ne. kaj se ne, UEA devas ĉesi sendadon.

Kunsido de KAEM ne povis estis efektiva ĉar multaj el la estraranoj ne ĉeestis. Oni proponis ke ni okazigu Sudazian Seminarion de Esperanto en Nepalo. La kunsido Budhana Ligo Esperantista ankaŭ ne allogis multajn partoprenantojn. Mi proponis ke ni okazigu Budhanan Semirinon en Nepalo por disvastigi esperantisto-budhanojn kaj por diskonigi budhismon de Nepalo al la mondo. Post mi iris al la ILEI kunsido

kie oni planis por la venonta ILEI konferenco. La koncerto de Reverie kaj Kajto estis interesaj. Esperanto ja havas multajn interesajn muzikgrupojn, ĉefe en Eŭropo. Ĉar la 29a de julio estis la lasta tago de kunsidoj, ŝajnis ke homoj ne plu volas kongresumi. Pli multe da homoj troviĝis ekstere kaj nur malmulte da homoj serioze sidas en ĉambroj nuntempe.

De tagmezo ni estis je preparado de internacia vespereto. Nepalanoj multe devis labori por prezenti nepalan kanton kaj dancon dum la internacia vespereto. Estis amuza sperto partoreni en la brazila danco-grupo. Ni dum 30 minutoj lernis tiun dancon kaj prezentis en la halo. Tia maniere, mi povis proksimiĝi kun nekonataj kongresanoj. Tuj poste komenciĝis la internacia vespereto. Artistoj el Francio, Danio, Indonezio, Nepalo, Japanio, Svedio kaj aliaj prezentis kantojn kaj dancojn. Nepalanoj dancas laŭ la kanto "beni ko bazar". Denove, kantado de Kim estis tre interesa.

Jen la fino de la kongreso. Post hasta, kapdolora, ekscita kaj ĝoja kurado de unu ĉambro al alia ĉambro, ni venis al la fino de la kongreso. La solena fermo okazis metene la 30an de julio. Dum la fermo, ĝenerala sekretario Barbara Pietrzak prezentis raporton. HORI Jasuo el Japanio ricevis "esperantistan pacpremion", Premion Deguĉi kaj Ileana Schroeder prezentis LKK-anojn kaj la helpantojn la la podio. La ĉeestantaj kongresanoj aplaudis ilin por ilia transdonis la kongresan flagon al Nguyen Van Loi, la prezidanto de LKK de la 97-a UK en Vjetnamio.

Interese, mi renkontis multajn homojn dum la kongreso, kiuj konas min per la Facebook, Ipernity aŭ per mia blogo. Iam ili konas min kaj mi ne memoras aŭ iam okazis inverse. Sed ni tre ĝojis kiam niam virtualaj konatuloj venis kaj brakumis min. Ili gratulis min por mia daŭra ĉeesto en la reto kaj komunikado pri nepala Esperanto-movado per la reto.

Mi, Nabin, Peter kaj Lone veturis laŭ la kanalo per boato. La vetero de Kopenhago estis interesa—iam varmiĝas, iam ventas kaj iam pluvas en minutoj, kaj vi devas esti ĉiam preta por ĉia vetero. Ankaŭ mi vidis la mondfaman statuon de la marvirineto.

La 31an de julio mi havis ŝancon viziti la nepalan konsulon Prakash Suvedi por tagmanĝi. Li diris ke estis pli ol 3,000 nepalanoj vivantaj en Danio. Poste ni promenis en la bela cervo-parko kaj amuzejo apude.

La 1an de agosto, ni vizitis al la maro. Mi, kiel loĝanto de montara lando, tre amas esti en maro—kiam mi vidas akvon kaj akvon ĝis la fino de la vido. Ŝokis min la vido de la marbordo kie homoj eĉ ĝuis sunon kaj naĝadon tute nude!



Ni volis celebri la lastan tagon en Kopenhago la 2an de aŭgusto. Posttagmeze ni veturis al la "stranga" kvartalo de Kopenhago Christiania. Troviĝis dekoj da vendejoj de

strangaj ornamaĵoj el Bharato, Ĉinio kaj ankaŭ Nepalo. Oni eĉ malferme vendis haŝiŝon. Mi demandas sin, ĉu ili vivas vere libere? Aŭ ili mem faris regulon por malliberigi sin en tiu kampo?

Poste ni ankaŭ havis tempon por viziti la reĝinan palacon. Estis interese ke la dana reĝino permesis homojn veni ĵus apud la pordo. Neniu gardas la palacon krom tiel bele vestitaj gardistoj.

Vespere mi veturis al Germanio per trajno. Mi ĝoje vivis en la vilaĝo de Fachingen dum kvar tagoj kaj du taoj en Frankfurto.

Nur la 9an de aŭgusto, mi revenis al Kopenhago, denove mi tranoktis ĉe Peter. Rstis iom da mono ĉe mi kaj mi elspezis je aĉetado de donacoj por mia familio. Kelkaj nepalanoj ankoraŭ restis ĉe Peter.

La 10an de aŭgusto, Peter veturigis min kaj Nabin al la flughaveno. Kaj mi, kun ĝojo reiri hejmo kaj kun malĝojo lasi tiom zorgantan amikon Peter, iris en la aviadilo.

Jen mia partopreno en la UK kaj vojaĝo en Danio estos ĉe mia memoro dum la tuta vivo. Mi estas tre feliĉa kun la gastamo de danoj kaj mi esperas ke mi ankaŭ havos oportunon gastigi la danojn, kiuj multe helpis min dum mia vojaĝo.

verkis **Razen Mmandhar**, el Nepalo

Fonto: <https://medium.com/@razenmanandhar/mia-sperto-de-uk-en-kopenhago-492b5bf5e524>

“Viro, kiu spiras Esperanton, kaj kiu vivas Esperanton”.

Dum la malferma Tago de UEA en Roterdamo la 28-an de aprilo 2018, Rob Moerbeek iĝis Kavaliro en Ordeno de Oranje Nassau. Ĝi estas prestiĝa distingo, fare de la reĝo de Nederlando por nederlandanoj por eksterordinaraj atingoj por la socio.



Enmaniĝis ordenon la urbestro de Beverwijk, kie s-ro Moerbeek loĝas. En sia parolado la urbestro diris, ke li estas “*Multflanka, energia kaj fervorega viro, kiu ne scipovas diri Ne.*”

Mi korespondas kun Rob Moerbeek ekde 11 jaroj, dum kiuj mi komprenis kaj nun jesas la vortojn de la urbestro. Sed kiu estas li? Multe da homoj konas lin.

Li naskiĝis dum 1936 kiel dua en familio kun kvar knaboj kaj ĉiuj ricevis superan klerigon. Ĉiuj fratoj muzikas diversajn instrumentojn, Rob – ludas pianon. Li scias kaj uzas krom nederlandan, ankoraŭ hebrean / ĝin lernis en lernejo / , latinan, grekan, historion, iam anglan... Tio helpas al li multe en lia laboro. Dum nia longa korespondado, mi certiĝis, ke li multe scias, homo kun multflankaj interesoj, iam li min surprizis kun siaj scioj.

Liaj gepatroj estis esperantistoj kaj li daŭrigis ilian amon al la lingvo. Li estis privatdocento pri Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo 1978-1998. Ekde 2001, li reprezentas Ligon internacian de Blindaj Esperantistoj en la Komitato de UEA. En 2013 mi vidis lin unuafoje dum la internacia kongreso de LIBE en Obzor, Bulgario.

Al mia demando de kiam li scias Esperanton, li respondis tiel: “*Esperantisto mi estas preskaŭ denaske: miaj gepatroj ambaŭ estis esperantistoj.*”

Tamen en la hitlera tempo ili ne povis praktiki: nur post la dua mondmilito, kiam la UK estis anoncita por Harlema 1954, ili reaktiviĝis kaj tiam dum dimanĉaj promenoj ili parolis ekskluzive en Esperanto, kiun mi kiel gimnaziano sufiĉe bone komprenis. Mi atingis mian superan diplomon en 1968: tiam mi jam aktivetis ekde 1963, vizitante lokajn klubojn, unue en Almelo / laborista grupo/, poste en Groningeno / neŭtrala grupo /. Do mia esperantistiĝo okazis en etapoj. Plej intense mi lernis uzi la lingvon en la Centra Oficeo / ekde 1969/.”



Ankoraŭ: “*Esperanto gravas al mi pli ol la aliaj denaskaj lingvoj: longe ĝi estis la hejma lingvo kun Nora. Kaj enestas la korvarmiga interna ideo: ni kunapartenas al unu homaro, devas kunbatali por pli bona mondo, daŭripova kune kun la aliaj vivaĵoj, kiujn ni respektas kiom eblas.*”

Ekde 1969 li laboris 32 jarojn kiel oficisto de UEA. Li prizorgis la Bibliotekon Hodler kaj la arkivon de la CO. Post la emeritiĝo en 2001, li laboras volontule en la CO.

Li korektas la revuojn Esperanto, Kontakto, Monato – nur parto., Internacia Pedagogia Revuo, Scienca revuo/ iam/, Esperantista Vegetarano, “NGGE SCIIGAS”...

Li multe amas kaj prizorgas pri la Naturo. Li estas vegano, eldonas la revuon Puraj pulmoj, ŝatas bicikli...

Jen kion li skribis al mi: “*Post la forpaso de Nora, mi rilatis kun aktivulino pri nefumismo. Ŝi estis vegano kaj klarigis, ke agrikultura ekonomio postulas mortigadon de virbovidoj, neutilaj pro la laktaĵa komerco. Tio konsciigis pri la rajtoj de la bestoj. Mi ankaŭ vidis hororfilmon pri virbovido plene baraktanta antaŭ ol eniri buĉejon: vere kortuŝe kompatinda. Ne estis granda ofero rezigni pri bestaĵoj. Mi sentas min pli sana spirite kiel bestamanto / ĉio havas siajn limojn: mi ja ne ĉiam ŝparas ĝenajn insektojn, kvankam mi ne manĝas insektaĵon, kvankam mi konscias, ke ĝi povas savi homvivojn en malsatlandoj. /”*

Li vizitis multe da kongresoj de UEA / mi gardas kartetojn, senditajn de li el diversaj landoj./ Li skribis al mi: “*La kongresoj de UEA riĉigas la vivon: la*

>>>

En la historio de Literaturo, verki “por adoleskuloj” ĉiam estis konsiderita facila tasko: ĝenerale estis sufiĉe selekti plej komunajn, ĉiesajn travivaĵojn (lernejaj problemoj, unuaj enamiĝoj, disputoj kun la gepatroj, ktp), iom plenigi ilin de kelkaj membiografiaj notoj, aldoni specialan fakton, tute fantasta kaj interesveka en la vivo de adoleskulo, kaj jen nova libro! Tiu ĉiam estis neerarema recepto de la beletra kuirarto!

Tamen, tiel agi estas, hodiaŭ, kvazaŭ danci borde de abismo. Kiel dirite de la brazila kantisto Renato Russo, “estonto ne plu estas tia, kia ĝi estis antaŭe”: pro la teknologiaj revolucioj de la lastaj jardekoj, adoleski ne plu similas al tio, kio ĝi estis en la generacio de la aŭtoro(j). Adoleskantoj, ĝenerale, ne plu legas (almenaŭ memvole), kaj, ĉar ili interrete vivas en/per/laŭ/tra siaj poŝtelefonoj (estas eĉ kelkaj, kiuj neniam uzis “tradician” komputilon...) la ideo mem de tio, kio estus fantasta por ili, ne plu kunrespondas al tio pri kio ni pensadis antaŭ 30-jaroj...

Ruze eskapi al tio estas unu el la plej gravaj meritoj de “La Enigma Trezoro”, ĵus lanĉita romano de la laborema esperanto-verkisto Julian Modest. Certe en la libro svarmas membiografiajn notojn: ne hazarde la ĉefrolulo nomiĝas Georgo – la tuta Esperantujo ja scias, ke la vera nomo de Julian Modest estas Georgi Mihalkov – tamen, tio ne fariĝas la centran punkton en la rakonto mem: tiu loko estas reverzata al serĉado de trezoro kaŝita, ne de nigrobarbaj piratoj, sed de homoj el la bulgara pasinteco, en insulo ne tro fora, sed jam en la maro; igas tiu rakonto interesveka por ĉiuj kiuj amas aventurajn romanojn.

Ankaŭ la rakonto pri la komencanta amrilato de Georgo certe resonigos en ĉiuj ni personajn nostalgiojn, kiuj akompanataj de la memoraĵoj kaj kanzonoj de niaj propraj unuaj amoj, igos la romaneton eĉ pli interesa por jam adoltaj legantoj ol por veraj adoleskantoj, por kiuj tiuj aferoj ne havas

(kaj verŝajne neniam havos) la saman signifon ol iam ili havis por tiuj, kiuj nun estas pli ol kvardekjaraj.

En la sesdekelkpaĝa romaneto de Modest, kiu ja preferas modestajn volumojn, Esperanto ja ludas interesan rolon, ne nur ĉar la precipa rolulo, kaj lia avo, estas ja esperantistoj, sed la aŭtoro, lerte kaj ruze, enŝovis iom kaŝe, diversajn referencojn al la esperanta kulturo, ne estas hazarde, ke oni mencias Tibor Sekelj, ke ili sidas en “seĝo sub pomarbo” – kiun memorigas nin pri la ĵus reeldonita de Julio Baghy “Sonĝe sub pomarbo”; same ne hazardas, ke, same kiel la famega poemo de nia pioniro Antoni Grabowski, la loka kulturdomo nomiĝu “Tagiĝo”. Krom tiuj, estas aliaj mencioj al faktoj, verkoj kaj personoj de la esperanta kulturo kiuj kaŝatas en la modest-a teksto, sed mi permesos al ebla legonto ilin malkovri per si mem.

(Fakte, ĝuste tiaj referencoj igas tiun verketon vere rekomendebla por legado en kursoj por progresantoj de nia lingvo, kiam estas interese ekenkonduki ilin ankaŭ al nia kulturo).

Do, mi diras al iu ebla, nuna leganto: provu malkovri, vi mem, kiu estas la enigma trezoro en la nova libro de Modest, vi certe ĝuos tre agrablan legadon!



verkis **Fernando Pita**
el Brazilo

MODEST, Julian. La enigma trezoro – romano en Esperanto por adoleskuloj. Ĝurdevac: Dokumenta Esperanto-Centro, 2018.

>>> *kontakto kun tiom da diversaj samsortanoj kun iliaj diversaj kulturoj estas interesega, iel vivnecesa por mondano. Mi konstatis, ke ankaŭ fremdlande viglaj gejunuloj bone uzas la lingvon kaj estas veraj esperantistoj laŭ la interna ideo. Grave ankaŭ konstati, ke ni uzu la lingvon simple kun komencantoj en Ĉinio, Koreio...*

Mi komencis tiun rakonton por li kun vortoj pri la altnivela ordeno, sed li havas ankaŭ aliajn premiojn- Deguchi, 2000, estas honora membro de UEA, longjara membro en la Komitato de UEA, dumviva

patrono de TEJO...

Mi fieras la amikecon kun Rob Moerbeek- amiko, kiu vere ne povas malakcepti la homajn petojn. Li estis konsilanto de kelke da miaj libroj, rakontoj k.a. Koran dankon! Estu ĉiam nia amikeco – pura kaj hela!

verkis kaj sendis **Elena Popova** el Bulgario

Facilaj rakontoj

Tagoj kaj semajnoj

Ne ĉiuj konsideras la unuan tagon de la semajno lundo. Angloskala kulturo konsideras la unuan tagon de la semajno dimanĉo kaj muzulmanoj sabato.

Eĉdifini tion, kio estas tago, estas malfacile. Tago, kiel 24 horoj, estas difino moderna kaj multaj lingvoj, anstataŭ adopti tute novan vorton por priskibi tiun periodon, daŭre uzas la vorton tago. Por multaj la tago komencas, kiam suno aperas, do, daŭro de la tago varias dum tuta jaro.

La anglaj kaj germanaj nomoj por tagoj devenas el Skandinavio, kie estis origine uzita kvin-taga semajno. La skandinavoj fondis siajn nomojn sur greka kaj romiana mitologio: Woden kaj Merkuro (ambaŭ dioj de milito) kaj Friggs kaj Venuso (ambaŭ diinoj de amo). Sabato ankoraŭ hodiaŭ en Islando, Svedio kaj Danio estas konata kiel „bantago“ (Laugardagur, Loerdag), ĉar oni ne povis trovi teŭtonikan ekvivalenton por romia Saturno – dio de agrikulturo. La problemo estis solvita laŭ romianaj soldatoj, kiuj regule banis sin je tiu tago.

La sep-taga semajno devenis el okcidenta Azio kaj ĝi disvastiĝis al Eŭropo kaj poste al norda Afriko. En aliaj partoj de Afriko oni trovas tri, kvar, kvin, ses kaj ok-tagajn semajnojn. La nombro de la tagoj korespondas al nombro de merkatoj en diversaj areoj. Fakte vorto „semajno“ estas la sama kiel merkato.

Ne ĉiuj lingvoj havas specialajn nomojn por la tagoj de la semajno. En multaj afrikaj lingvoj, ekzemple svahila, oni simple diras: unua tago, dua tago... Tamen, ilia unua tago ne ĉiam korespondas al nia unua tago, ĉar ĝi ofte estas sabato. Plimulto da antikvaj civilizacioj – egipta, babilona, majaa, ĉina ktp. – ne havis koncepton de semajno. Kontraŭ ili havis ciklojn de tagoj – dudek tagoj por majaa kaj azteka, anstataŭ sep tagoj eŭropaj.

Laŭ **Maria José Alvarez Faedo**, Eventoj n-ro 229/2002

Fraga smuzio

Ingrediencoj

300 g da fragoj
1 banano
iom da kreskaĵa lakto
iom da kreskaĵa jogurto
iom da agava siropo aŭ mielon

Preparado

Lavu fragojn kaj forigu de ili foliojn. Senŝeligu la bananon. Metu fragojn kaj bananon en miksaparaton, aldonu kreskaĵajn lakton, jogurton kaj siropon. Miksu ĉion. La smuzio estas preta! Verŝu

en glasojn kaj ornamu ĝin laŭ via plaĉo.

Fonto: <https://apetito.ikso.net/recepto/fraga-smuzio>



sendis Jindřiška Drahotová, el Ĉeĥio

Luna kaj suna kalendaroj

Dum ĝenerala kalendaro dependas de la Suno – jaro egalas tempon, kiun bezonas la Tero ĉirkaŭiri la Sunon (365,26 tagoj) – la hebrea kalendaro estas bazita je la Luno.

Ĉia ĉefa tempounuo estas luna monato, la periodo, dum kiu la Luno rondiras la Teron. Tio daŭras proksimume 29,5 tagojn. Tial la hebreaĵoj monatoj havas alterne 29 kaj 30 tagojn kaj la tuta jaro 354 tagojn..

Kiun kalendaron oni uzas nuntempe en Israelo?

Ŝtato, komerco kaj ĉiutaga vivo kutime uzas la ĝeneralan sunkalendaron. Sed por judaj festoj, kiuj estas ŝtataj ripoztagoj kaj ankaŭ por fiksi lernojarojn kaj por festi la religiajn datrevenojn, oni uzas hebrean lunkalendaron.

Ĉar la luna jaro havas 11 tagojn malpli ol la suna, akumuliĝas malfruo. Por korekti la daton laŭ la jaraj sezonoj oni aldonas ĉiun trian jaron kroman monaton kaj tiam la jaro havas 13 monatojn. Tio estas iom

simila al la aldono de unu tago al februaro ĉiun kvaran jaron.

Pro tiu korektado la judaj festoj okazas ĉiam

proksimume en la sama sezono, sed ne precize en la sama dato laŭ suna kalendaro. La diferenco inter du kalendaroj varias kun ciklo de 19 jaroj.

Laŭ hebreaĵoj la tago komenciĝas, kiam sur ĉielo aperas tri unuaj steloj.

Amri Wandel, Israelo



Solvo de la krucvort-enigmo

DO	LA	KO	ĈO
LO		DO	RI
MI	A		ZO
TOJ	RA	ĜI	
		ĈO	HI
		BA	DRA
ŜI		ĴO	TI
PA	AL		ĜI
RO	TA	BRAL	

